6-a Jaro. N-o 282 APERAS 

SEMAJNE Leipzig, 27./2. 1930

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerfiner

"GRANDAJ VIROJ"

Betoven (Beethoven), la genia komponisto, dediĉis sian trian simfonion, la "Heroan Sinfonion" al la juna liberiganto de la popolo, la konsulo Napoleono Buonaparte; ĉar li admiris tiun viron, kiu batalis por la juna franca respubliko kontraŭ la malamikoj de popollibero. Sed, kiam li aŭdis, ke tiu konsulo faris sin imperiestro, Betoven furioze disŝiris la titolfolion de sia majstroverko, ekkriante: "Do ankaŭ li ne estas pli bona ol la aliaj".

De tiam la vivo de tiu kapabla viro Napoleono fariĝis malbeno por la tuta Eŭropo. Ĉiuj eŭropaj ŝtatoj refalis post lia morto en la regadon de plej nigra reakcio, kaj la sola konkreta bilanco de lia agado estas grandega nombro da homoj mortigitaj, da familioj mizerigitaj. Betoven ne studis sociologion; sed lia sana instinkto diris al li, ke en tiu decida momento la viro, kiu en la komenco estis kunlaboranto en la penado, por forigi la mizeron el la mondo, por liberigi la suferantan popolon el la jugo de ĝiaj premantoj, perfidis sian ideon kaj fariĝis sklavo de sia ambicio.

Tamen, historiistoj skribis dikajn librojn por glori la memoron de Napoleono, kaj nun ankoraŭ ekzistas milionoj da homoj, kiuj admiras tiun viron. Ĉu la kapablo en si mem estas glorinda? Ĉu simple ĉiu energia persono, kiu havas sukceson, meritas gloron? Tiam ĉiu rabisto-ĉefo pro sia energio, ĉiu lerta ŝtelisto estus pli estiminda, ol personoj, kiuj fidelaj al sia konscienco senĉese laboradas, ofte en la ombro, por ke la estonta tempo estu pli bona ol la estinta.

El la amaso da socialistoj en la tuta mondo, eble eĉ ne unu el mil personoj konas la teoriajn verkojn pri socialismo, komunismo, popolekonomio ktp.



de la ĉiunuancaj gvidantoj de la socialista aŭ komunista movado. Sed *tiun* firman konscion ĉiu el la kunbatalantoj havas, ke tiuj progresaj ideoj fine detruos la idolojn starigitajn por la profito de regantaj klasoj: nacio, eklezio, tubforma ĉapelo (simbolo de solidaro inter la idolanoj de kapitalisma kulturo).

La regantaj klasoj ĉiel klopodas per sentimentaloj tiri la regatojn en trompan penssistemon, kiu kaptas ilin. Ili starigas monumentojn pri la milito (verdire ili estas nur reklamiloj por estonta milito kaj plua militarismo); ili aranĝas tombojn de Nekonata Soldato (kun sama signifo), por flati la amason de la sennomuloj; ili dekretas solentagojn kaj solenminutojn pri aferoj, pri kiuj ĉiu civilizita homo devus honti; ili ne diras, ke sinjoro X. aŭ Y. estas en hontinda maniero buĉita dum la milito, sed ke li "falis". La aldonon "por la patrujo" oni jam ne plu eldiras; ĉar ĝi jam fariĝis tro stereotipa kaj ridinda.

* * *

Musolini, kiu estas admirata de multegaj burĝoj, kvankam eĉ laŭ ilia moralkodo li ankoraŭ ne faris ion glorindan krom grandaj gestoj de kinematografa aktoro laŭ stilo de la lasta germana imperiestro, perfidis la laborantan klason, al kiu li apartenis kaj kiu en la komenco donis al li la eblon de lia kariero.

Li bone scias, ke patriotismo estas trompvorto por la popolo, kaj nun li komercas per patriotismo. Li bone scias, ke naciismo estas la malamiko de la laborantoj kaj ke nur la internacia unuiĝo de ĉiuj proletoj povos forigi la mizeron de la laboranta klaso. Kaj nun li estas la plej laŭta ŝovinisto. Li bone scias, ke la eklezio stultigas la homojn por la profito de la regantaj klasoj kaj ke la interligo de ŝtato kaj eklezio estas la plej efika rimedo, por eternigi la mizeron de la premataj klasoj. Kaj Musolini tute kaŝe, ĉar li estis liberpensulo kaj ekstereklezie edzigita, prenis la formalan benon de la pastroj, favoris ĉiel la katolikan eklezion kaj ebligis la kontraktadon inter la papa kaj la itala registaroj. Lia tuta politiko, de la

LIBERTEMPAJ IMPRESOJ EL IRLANDO

Estis dum aŭgusto 1928, kiam ni per malkaraj biletoj iris transmaren al Dablin (Dublin). Nia ŝipo havis kapablon porti 1500 personojn, sed ne komforte. Ni malfruiĝis pro densa marnebulo. Post esploro de nia pakaĵaro en Dablin, ni ekbiciklis eksterurben al dometaĉo, kie ni matenmanĝis. Tiam ni sciiĝis, ke la angla vizitanto estas ekspluatata hontege de la dometularo, escepte se oni antaŭe interkonsente fiksas la hotelprezojn. La vojoj estas tiel malbonaj, ke estas permesite bicikli sur la piedvojetoj. En Ŭiklo (angle: Wicklow), Arklo (Arcklow) k Dablin estas statuoj de ribeluloj, kiuj estis mortigataj de la brita imperialistaro.



Novaj irlandaj moneroj

Ĉevaloj k azenoj estas videblaj ĉie, k la aŭtomobiloj estas malmultaj ĝis nun. Malriĉo, pastraro, malbonaj higienaj aranĝoj k malklero regas evidente ĉie, speciale en la vilaĝoj.

Ni estis akceptataj en ĉiuj lokoj kun bonkoreco, precipe kiam la loĝantoj trovis, ke ni ne estas imperialemaj. La influo de la katolika pastraro malkreskas.

Ni biciklis ĉirkaŭe 400 kilometrojn inter la montega kamparo de Ŭiklo k renkontis nur afablon k ĝentilan helpon. Du fojojn ni havis akcidentojn, k ni veturis dum la nokto. Ni neniam estis en danĝero, kvankam ni troviĝis en la centro de la ribel-regiono, kie la brita soldataro konstruis vojon por helpi venki la ribelularon.

Ĉie oni aŭdas la irlandan lingvon apud la angla. La du lingvoj estas instruataj en la ŝtata lernejaro. Ni renkontis lernejestron, kiu estas entuziasma pri la utilo de l' lernejo kontraŭ la brita imperialismo. Ni sendis poŝtkartojn al Anglio kun britaj poŝtmarkoj, kiujn ni portis el Anglio. Sed niaj amikaj ricevantoj devis pagi punmonon, ĉar la Irlanda Libera Ŝtato rifuzas la britan poŝtmarkon. La vojmontriloj havis surskribojn dulingvajn. La Libera Ŝtato havas sian propran armeon k forigis la britan nacian himnon anstataŭigante ĝin per la ribela kanto "La Soldata Kanto". La britaj emblemoj k flagoj kolerigas la irlandan popolon. La amaso tiris ilin el la fenestroj de tri domoj dum iu ĉevalara ekspozicio. La ribelo kontraŭ Britio rezultas de la fortiĝanta naciismo sub la influo de la burĝa klaso. La Respublika armeo k partio formas la opozicion al la burĝa registaro k estas preskaŭ egale fortaj kiel la registaro en la parlamento ("Dail").

La insulo estas malgranda, sed spite tio ekzistas du parlamentoj, la Norda, kiu malamike rilatas kontraŭ la Suda k estas parto de la Brita Imperio, dum la Suda memstariĝis de Britio. La Irlanda Libera Ŝtato havas sian propran monsistemon kun nacilingvaj surskriboj. La moneroj prezentas kokinon, porkon, anseron, kuniklon, hundon, bovon, fiŝon k ĉevalon, krome harpon: produktoj de tiu lando.

H. W., Peranto en Leeds (6255).

---

komenco, kiam en la jaro 1914 li transiris al la militemuloj, portas la stampon de perfido kaj mensogo, kaj ĉiu, kiu aspiras al progreso, devas eviti, nomi tian personon pro la sukceso, kiun li persone havis, granda viro.

Grandaj viroj povas esti nur tiaj, kiaj restas interne honestaj, t. e. fidelaj al si mem. O. B.



ĈEĤA NACIISMO

Estas ofte en "S-ulo" konstatita fakto, ke la novaj postmilite formiĝintaj ŝtatoj k ŝtatetoj ne postrestas siajn pli aĝajn fratojn je ŝovinismo. Kiu estis en jaro 1921 (fondiĝkongreso de SAT, universala kongreso de esp-o) en Prago, spertis, ke la ĉeĥa ŝovinismo floras k prosperas. Eltiroj, kiujn faris K-do 409 el nova lernolibro pri geografio por superaj lernejoj, montras, ke simile kiel en aliaj landoj la nacia memfiero, la eduko al ŝovinismo k malŝato kontraŭ aliaj nacioj, trovas en ĉeĥaj instruiloj sian esprimon. La iamaj subpremintoj de l' ĉeĥa naciismo, Aŭstrio, Hungario, ankaŭ Germanio estas komprenеble malame k malestime traktataj. Tio kaŭzis interpelacion de la germanaj k hungaraj deputitoj — la novaj malplimultoj — en la ĉeĥa parlamento. Esence, kiel oni vidas, nenio ŝanĝiĝis. El la naciaj subpremantoj de hieraŭ fariĝis la naciaj subprematoj de hodiaŭ. Nur neinteresiĝo je tiuj naciaj interbataloj povas esti la devizo por la proletaro, kies sorto ne decidiĝas per la venko de tiu aŭ alia nacia grupiĝo.

Laŭ informaĵo de K-do 409.

Homara sento supervenkas naciismon

Malama sento inter malamikaj nacioj dum militoj estas plejparte nenature incitata kaj nutrata per fipropagando de sagacaj militestroj. Nur por la plej malgranda parto de nacio validas, ke tiu malestimo kontraŭ aliaj popoloj sin bazas sur patriotisma honorsento ofendita kaj venĝema. Precipe la larĝaj tavoloj popolaj kun pli malpli laŭnatura sento kaj nekripligita pensmaniero vidas en la kontraŭmilitata alinaciano laŭ sana instinkto unue la homon kaj nur due, laŭ ekstera ordono, la malamikon. Multaj pruvoj el militaj tempoj atestas, ke la homara sento naturorigina supervenkas la naciisman antaŭjuĝon artefaritan.

Jena travivaĵo mia el la "glora tempo" de la mondmilito prezentas konvinkan ekzemplon: Kelkcentoj da francaj militkaptitoj, flankitaj de germanaj soldatoj, trairas, ĵus veninte de la stacidomo, la stratojn de malgranda urbo germana. Klinitaj la kapoj, apatiaj la rigardoj, peze antaŭentrenante la malfortajn piedojn, kun multfalde sur malgrasegaj korpoj movpendantaj uniformoj, la malgranda irantaro emocie spegulis la sensencajn suferojn de kruela milito. Multaj pasantoj preterirantaj kompatrigardis la mizeraspektajn, svenantsimile formoviĝantajn kaptitojn. Kiam ĉi tiuj haltis en korto de lernejo, jam la tuta urbeto sciis pri iliaj alveno kaj malbona stato. Multegaj urbanoj alportis abundon da nutraĵoj, kiel panon, arbfruktojn, terpomojn kaj aliajn aĵojn manĝeblajn por la "malamikaj" soldatoj. Ĉar la gardantaj germanaj soldatoj ne toleris alproksimiĝon al la francoj, la aro staris antaŭ la ĉirkaŭkorta krado, en la manoj tenante la nutraĵojn, ne sciante kiel doni ilin al la kaptitoj. Subite komenciĝis bombĵetado trans la kradon, celdirektita al la grupo el francoj, neniam de ili vidita, ĉar la alsusurantaj bomboj estis nutropakaĵoj el la manoj de civiluloj.

Okazis, ke kelkaj paketoj falis teren plurajn metrojn antaŭ la kaptitoj kaj tiuj, saltante ekstervice por ekpreni la donacojn, tuj estis rekompencataj per pafilkapaj batoj de la gardsoldatoj. Tiu ago, laŭtproteste malaprobita de la popolo, kaŭzis disputon inter germanaj soldatoj kaj urbanoj minacantaj anonci tiun malhumanan traktadon kontraŭ malfortuloj al svisa ĵurnalo. Por ĉesigi la konflikton la kaptitoj devis okupi la lernejajn ĉambrojn, de kies fenestroj altetaĝaj ili teren pendigis siajn ladajn kuirpotojn fiksitajn je ŝnuroj plurope kunligitaj. Ĉar alvenis ĉiam pli kaj pli da loĝantoj, la potoj ĉi-okaze estis plenplene ŝtopitaj per nutraĵoj, kvankam tiutempe la manĝaĵoj estis haveblaj nur per urboficaj

kuponoj laŭ neceskvanto po kapo. Sed la helpema loĝantaro nur vidis la palajn vizaĝojn de la kaptitoj kaj plenkontentiĝis per iliaj dankesprimoj helpe de mansvingo, ĝojrido kaj fremdsona parolo nekomprenebla. Germana oficiro ĉagreno konstatante tiun persistan interfratiĝon preskaŭ patriperfidan inter germanaj civiluloj kaj malsatantaj malamikoj ordonis fermi ĉiujn fenestrojn, tiom je malplaĉo al la urbanoj, kiom al la kaptitoj.

A. Huemer (13 885).



La turkoj artefaras lingvon

Kun la enkonduko de l' latina alfabeto lastoktobre en la turkaj lernejoj efektiviĝis samtempe forigo de la instruado de araba k persa lingvoj en la liceoj, kiuj estis anstataŭataj per eŭropaj fremdlingvoj. La ĉefa malhelpo por disvastigo de l' turka lingvo estis ĝia malsimpla gramatiko, ĝia stranga ortografio k la amaso da arabaj k persaj vortoj, kiuj konsistigis preskaŭ la tutan turkan vortaron. La komuna vortaro estas tre malriĉa: kamparano disponas pri apenaŭ 800 vortoj por sin esprimi, malklerulo en grandaj urboj pri 1200, elemente klerigita homo pri 3 mil, klerulo pri 10 mil vortoj. Sed la turka vortaro ampleksas 30 mil vortojn! Tial ekzistis tiom da analfabetoj (90% ĝis antaŭ jaro) en Turkio, ĉar la alfabeto estis tiom komplika.

La ĉefa merito de l' nova reformo estos faciligi al la popolo scipovon de sia lingvo, levi ĝin el la nuna malklero. La problemo sekve ne estas nur lingva, sed socia. La alpreno de l' nova alfabeto estus nekompleta, se ne samtempe okazus purigo de la turka lingvo per forigo de arabaj k persaj vortoj. Dum pli ol jaro kleruloj ellaboras novan vortaron. Ili preferas turkan vorton, se ĝi ekzistas, al araba aŭ persa, k se ne ekzistas, ili kreas novan laŭ okcidenta lingvo. Tiu reformo ĉagrenis kelkajn tradiciulojn, kiuj vidas malkomprenebliĝi ĉefverkojn literaturajn. Certe iliaj timoj estas pravaj. Sed temas nur pri malgranda kvanto da verkoj jam nun nekomprenitaj de la plimulto da legantoj. Ili apartenos estonte nur al lingvistoj-specialistoj. Pure nacian literaturon turkoj nur posedis, antaŭ ol ili konkeris la Orienton. Venkita Persio akceptigis al la venkintoj sian kulturon k lingvon (anstataŭ inverse!). La araba lingvo enkondukiĝis kun la islamo. Turka lingvo longe restis nur parolata; skriblingvo ĝi fariĝis nur post venko de Karaman, sed tute hibrida pro la araba alfabeto k miksvortaro. Nur la postmilita Turka Respubliko kapablis krei la institucion, kiu nun artefaras novan turkan lingvon kun latina alfabeto. Ĉia progreso rezultas de artefariteco.

La skismo inter la laboristaro organizita malutilas ĉie

Antaŭe en la plej multaj komunumaj parlamentoj de Saksio la du laboristaj partioj (socialistoj k komunistoj) havis la plimulton. Malgraŭ diversaj malhelpoj inter la du partioj k en batalo kontraŭ burĝaro estis atingataj kelkaj rezultoj, progresetoj je la intereso de la laborularo k socialismo. Se ne sufiĉaj estis la atingoj, kulpas pri tio la realaj cirkonstancoj lokaj, faktaj, en kiuj la laboristaj partioj batalis por siaj celoj.

La espero, ke en venontaj parlamentoj estus atingataj pli bonaj rezultoj, k regus malpli da disputemo inter lab. partioj mem, estis en la koro de ĉiu sincera K-do, por povi tiri al nia flanko por ĉiam la indiferentajn lab. amasojn. La ĝisnunaj interdisputoj k bruegoj ĉe la lab. partioj en la parlamentoj ne servis al la interesoj de l' interna unueco, sed male utilis al la burĝaj partioj. Okazis la nova baloto, sed la espero atingi pli bonajn rezultojn, pli grandan unuecon por la laboristoj en la novaj parlamentoj, ol antaŭe, ne plenumiĝis. Per la baloto burĝaj partioj k ekstreme naciista partio iomete gajnis. ili estis plenaj da ĝojo pri tiu kontraŭlaborista venko.

Sekve de tio multaj kun la laboristaj partioj simpatiantaj personoj esperis, ke ĉi tiuj nun pli forte, pli unuece batalos en la komunumoj por la socialismo. Sed la malo okazis. En la plej multaj komunumaj parlamentoj la agado signifas iluzion por la laboristoj, miregon, samtempe ĝojon por la burĝoj. Ĝis nun ekzistis en tiuj parlamentoj kompromiso inter socialistoj k komunistoj. sed hodiaŭ ĉi tiu stato preskaŭ nuliĝis.

La nekompromisemo inter la laboristaj partioj malhelpas ĉian laboristaran progreson, en nacia k internacia skalo. Same en nia esp. movado resonas eĥo de tiu ĝenerala disiĝo inter la laboristaj tendencoj. Pro tio ankaŭ nia movado ne progresas tiom, kiom ni dezirus. Ekzistas tiom da esp-istoj, kiuj povus aktive subteni nin, sed kiuj venas al ni nur por lerni, aŭdi esp-on, ne aliĝante nek al LEA nek al SAT . . . ĉar ili memoras pri la ĉieaj interlaboristaj disputoj. Ĝis nun tamen la lab. esp-istoj solaj sciis konservi en sia organizo la unuecon intertendencan. Tio estas la merito de lojalaj, sinceraj K-doj, kiuj konscias, ke la disiĝo ne povas esti en la intereso de nia movado. Aliel estas en la naciaj lab. organizoj, ĉe sportuloj, liberpensuloj k. a., kiuj staras sur la sama fundamento kiel SAT: tie sen fino furiozas la skismo, malfortigante la lab. movadon. Jam ofte pereis malfortaj grupiĝoj, sekcioj pro la skismo. Ankaŭ ĉe ni montriĝis tiaj simptomoj, kiuj ne pli etendiĝis nur dank' al la prudento de multaj inter niaj K-doj. Evitante skismojn, ni akiris la konfidon k simpation de ĉiuj sinceraj batalantoj por nia movado.

Labori en tiu senco devas esti nia ĉeftasko, se ni volas progresi ĝis fina efektivigo de tutmonda proletara unuiĝo. Nur tiu laboristaro organizita, kiu celas unuecan kunlaboradon supertendencan, povas servi kiel fundamento por nia laboro, estas garantio por nia antaŭeniro.

M. Häckel (1162), Leipzig.

1870/71 kaj 1914/18!

La milito 1914/18 ne estis profito por Germanio. Se ĝi estus profito . . . ĉu la germanaj militvunditoj, vidvinoj kaj orfoj havus pli bonan vivon ol nun? Mi asertas, ke ne. Kiel pruvon mi sekvigas tabelon pri la sumo, kiun ricevis la "germana patrio" kiel rekompencon de Francio post la milito 1870/71. El tiu ĉi tabelo ĉiu laboristo vidu, ke profitoj, dum milito kaj paco, fluadas en la poŝojn de la posedantoj. mallaboruloj kaj "gvidantoj de armeoj". Nuntempe la germanaj patriotoj kaj faŝistoj diras al la germania proletaro: "Jen, se ni estus venkintaj, tiam la tuta germana popolo vivus pli bone! Sed la "malamikoj trans la landlimoj" elsuĉas Germanion. Tio estas la kaŭzo de via mizero. Batalu kontraŭ la "malamikoj" de germana lando; poste via vivo pliboniĝos!" . . .

Gek-doj en ĉiuj terpartoj! La proletaro *ĉiu*landa daŭre vivas en mizero, ĉar la sistemo kapitalista elsuĉas *ĉiujn* laborulojn laŭ samaj metodoj. Ne la popoloj estas malamikoj inter si, sed nur la reganta klaso havas intereson je malpaco de l' tutmonda proletaro! Per esperanto ni disfrapu la mensogon de l' faŝista kapitalistaro: Super ĉio la patrio! . . . Proletoj, ne kredu la *parolojn* de viaj malamikoj (kapitalistoj, pastraro, generaloj, faŝistoj). Sed vidu la agojn, la faktojn, kiuj elmontras plej evidente la malbenitan mensogon: super la homo la patrio! Vidu mem: la kapitalistoj unuavice havas la saman intereson en ĉiuj landoj sendiference — ekspluati la laboristojn. Se la kapitalistoj volas militadi, tiam ili marŝu antaŭen mem, staru en la *unua* vico! Ĉiu laboristo devus rifuzi mortigi alilandan proleton, se la kapitalistaj vampiroj kriadas: Ĉiu donu ĉion por la kara patrio! — Por la proletaro ĉiu milito signifas danĝeron kaj malprofiton.

Francio (t. e. la franca proletaro!) devis post 1871 pagi al Germanio kvar miliardojn da markoj. La germanaj

laboristoj (la popolo) ricevis nur eretojn de tiu sumo. La plej grandan parton oni disdonis inter riĉularo kaj parazitoj:

	milionoj da mk. g.
rekompenco al ŝip-posedantoj . . .	16,8
militrekompenco al "privatuloj" . .	110,0
emisioj por fervojo en Elzaso-Lotaringio	55,2
donac-fondo por "meritoj je la patrio"	12,0
"milit-trezoro"	120,0
armado de fortikaĵo sur la german-franca landlimo	255,0
elspezoj por okupado de franca regiono	72,0
pago de "regna ŝipara prunto" . . .	32,0
pagota sumo por ŝtataj invalidoj . .	561,0
regna ŝiparo	87,0
nova regna parlamentejo	24,0
germana armeo	326,5
repago de regnaj pruntoj	1 795,0

La restsumon "oni" disdonis inter ĉiuj sub-registaroj germanaj (Bavario, Badeno ktp.). La sumo "donac-fondo" fluis en poŝojn de arme-estroj kaj ŝtat-gvidantoj (salajro por buĉado!). Al la veraj herooj de la militoj oni disdonis ladajn ordenojn kaj "sumegon" de 15—25 mk. g. da monata rento . . .

120 mil ekssoldatoj germanaj de 1864, 1866 kaj 1870/71 (militjaroj) vivaĉas ankoraŭ nun en mizeraj kondiĉoj. Ĉar ili ne povas vivi "kiel herooj de l' patrio", tial oni kolektas publike monsumon por ili! Sed, kontraŭe, alia bildo: Spite la malprofita milito 1914/18 multaj eksgeneraloj kaj "gvidintoj" germaniaj ricevas grandegan renton kiel militrekompencon. Ili ĉefe estas kulpaj pri tia hombuĉado kaj la mizero de l' germana laboristaro. Ili akuzas siaflanke la socialistojn pro la malvenko de "nia patrio". Ili malamas kaŝe aŭ malkaŝe la "demokratan respublikon". Sed ili tre volonte akceptas de tiu respubliko la grandan "militrenton". ("Mono ne malbonodoras" diras germana proverbo).

1851, Ŝvajdnic.

LA SKANDALO DE LA "FREMDULA LEGIO"

Karl Volf (Wolf), travojaĝante Germanion, ankaŭ atingis la urbon Forst (Laŭzic). Lia tasko estas, klarigi al la loĝantaro la vivon en la "legioj". Ĉefe li parolas pri la hispana. Same kiel multaj ili fariĝis viktimo de promesoj faritaj de varb-oficejoj. Oni devus opinii, ke tio ne plu estas ebla en nia epoko. Sed eraro! Jen la raporto de Karl Volf, kiu pere de K-do 15 015 ŝatas klarigi siajn suferojn al ĉiuj progresemaj homoj de la mondo. Ni kiel SAT-anoj devas ankaŭ aktive kontraŭbatali la malhumanan aferon de la fremdulaj legioj. Egalan rajton al ĉiuj homoj! *"Labkoroj-rondo", Forst (Germ.).*

Enkonduke de sia parolado Volf diras, ke estas multe disvastigita la opinio, ke ĉiujare multaj junaj viroj aliĝas al la fremdula legio pro aventuremo aŭ similaj motivoj. Sed li asertas, ke tio estas nur antaŭjuĝo. Kulpaj estas pli vere la kontinua ekonomia krizo kaj grandparte ankaŭ la promesoj de publikaj oficejoj. Tia varb-oficejo por Hispana Maroko troviĝis en Hamburg ĝis la jaro 1924, kun ŝtata permeso. Tiel ankaŭ Volf estis varbata je la plej favoraj kondiĉoj, same kiel 2000 aliaj junaj viroj en 1923/24. Li ricevis sian pasporton por Hispana Maroko. Tiele bonespere li eniris la vaporŝipon je 3-a de marto 1924. Dek tagojn pli poste li troviĝis ĉe la marbordo de Afriko, kontraŭe de Gibraltaro. Alveninte en Ceŭta li esperis finfine trovi laboron. Anstataŭ tio li ricevis alian vestaĵon necivilan kaj estis komandata iri en la montaron. Jen li troviĝis en la tiam fondita hispana legio. Oni uzis lin por batalo kontraŭ la rifkabiloj. Diktatora disciplino obeigis la nesindonajn rifuzajn samsortanojn per nesupereblaj torturo-metodoj. Kun sablosako ligita sur nudan dorson per maldikaj metalfadenoj, ili devis ronde marŝi ĉe sunvarmego de 60° antaŭ la viraro. Tio estis komenca puno. Pli poste estis ordonata "fortikaĵa" puno. T. e.: en puntaĉmenton komandite oni devis portadi ŝtonojn kaj aliajn ŝarĝojn. Ĉe plej etaj neobeoj aŭ kontraŭstaremo oni estis ligata al arbotrunko per maldikaj metalfadenoj. Multe pli grava puno, ankoraŭ nuntempe uzata, estas la enfoso en dezerta sablo, kiu okazas ĝis la kapo. Diligentaj gardistoj emas apliki la pli malmolajn punojn. Li mem devis suferi la torturon ĉe la martirtrunko tri horojn pro bagatela neatento. Humana posteno, kiu volis helpi al li per freŝa trinkaĵo, estis surprizata dum sia ago kaj devis mem sur lian vizaĝon ŝmiri mielon, por ke ĝi estu elmetita al la moskitoj dum tia sunvarmego.

Iu legiano Kuter (Kutter), familia patro kun kvin infanoj, estis mortpafata sen eblo defendi sin antaŭ tribunalo. Li ricevis kiel deserton inter bonaj ankaŭ du malbonajn fruktojn. Ĉi lastajn li ĵetis teren, ĉar li ne riskis manĝi ilin pro malsaniga efiko. Tio kaŭzis miskomprenon ĉe hispana oficiro ĵus alveninta, kiu ne atendante klarigon, ekpunis per pafo la "pekinton". La kuglo traboris ŝultron. Kiel vundito li estis komandata kun aliaj en puntaĉmenton kaj transportata al la hospitalo en Ceŭta, kie li alvenis kiel kadavro. Atesto de l' ambasadoro en Tetuan pruvas la veron de tiu okazo.

Malgraŭ ĉiaj tiaj punmetodoj timigaj okazas oftaj forkuroj. Ankaŭ Volf

---

KULTURTASKOJ

M. Krjukov

(3-a daŭrigo. Vidu n-ojn 279/81)

4. 2. Naciaj personaj nomoj liveras fonetikajn malhelpojn k grandan konfuzon en nia lingvo pro terura senordo k hazardo de ilia deveno. Uzo de naciaj nomoj daŭrigos la ĥaoson k la malŝparon da lingva energio. Krome — malnovaj nomoj ofte kontraŭas spiriton de Novo, ofte ili estas sensencaj, ofendaj k eĉ "malmoralaj" (Domno — sinjorino, Klaŭdio — lama, Ksantipo = ruĝeflava ĉevalino, kelkaj popoloj uzas la nomon de peniso kiel personan nomon). Tial sennaciiĝanta vivo de l' homaro postulas ordigon k simpligon, unuigon de nomsistemoj same kiel de mezursistemoj. Uzu jenan simplan k certigitan de Revolucio k de praktiko sistemon de nomfarado (mi nur motivigis, ordigis k ĝeneraligis la sistemon): Kunmetu personajn nomojn el komencliteroj de jenaj aktualaj vortoj: Asocio, Elektro, Energio, Esperanto, Evoluo, Ideo, Idealo, Internacio, Organizo, Unueco, Universo (la vokaloj A, E, I, O, U); Bono, Belo, Ĉarmo, Frateco, Ĝermo, Komunismo, Kooperio, Laboro, Libero, Lumo, Mondo, Novo, Povo, Revolucio, Socialismo, Soveto, Tekniko, Volo (la konsonantoj B, Ĉ, F, Ĝ, K, L, M, N, P, R, S, T, V). La kombinoj po 2—6 literoj el la citaj 18 literoj povas liveri ĉ. 4 milionojn da nomoj, ekz. *Am, As, Ulm, Kim, Ĝer, Lanti, Mor, Maks, Tan, Sat, Eol, Meor, Rames, Oira, Ema, Nal, Arn, Rut, Rem . . .*

Elektu el ili la plej taŭgajn, distingeblajn k belsonajn. Por ĉi tiu celo oni povas same uzi nomojn de ŝatataj objektoj (Rozo, floro, diamanto, oro k. s.), sed nur difinitajn. La kombinitaj literoj devas formi nur novajn, ekstervortarajn vortojn, por ke tiel oni distingu la nomon k ne miksu ĝin kun aliaj kategorioj. Familia nomo estas senbezona. Ĝin povas anstataŭi oficialeca *datnomo,* t. e. cifero de naskiĝjaro plena aŭ mallongita (*Nal 17* estas *Nal* naskiĝinta en 1917).

4. 3. Terminaro de sciencoj senĉese k senorde kreskas k homaro riskas droni en ĥaoso oceano da novaj vortoj-nomoj, kiuj senregule invadas homlingvon. Sole botaniko jam havas ĉirkaŭe 600 000 nomojn k kiom da ili estas en karbonĥemio, zoologio, geografio k en aliaj sciencoj! Kaj ili estas pezaj, multvortaj. Instigu al jena nova formado de l' terminoj-nomoj[1].

Ĉiuj objektoj de sciencoj (bestoj de zoologio, kreskaĵoj de botaniko ktp.) estas ordigitaj laŭ klasoj, subklasoj k specoj. Tial oni facile povas ilin nomi per ciferoj, kiuj respondu al iliaj klaso, subklaso k speco k prononciĝu kiel literoj. Tiel ĉiu nomo de scienca

[1] Mi proponas nur novan sistemon de pli praktika nomaro, ne novan "filozofian" lingvon.

entreprenis forkurprovon, sed estis rekaptata, kiel multaj el liaj samsortanoj. Ke preskaŭ ĉiuj forkurintoj revenas al la legio, estas klarigebla per la alta rekompenco, kiun la kaptintoj ricevas. Por ĉiu rekaptito la legio pagas 100 hisp. pesetojn (ĉ. 17 dolarojn). Dum unu preskaŭ sukcesinta forkuro Volf estis rekaptata en la internacia Tanger-Zono de angla oficiro, ĉe kiu li esperis trovi helpon kaj rifuĝon. Li elliveris lin al la legio kaj ricevis 100 pesetojn. Ree en la legio, li devis partopreni la militon kontraŭ Abd el Krim. Dum tiu ĉi batalo triumfis la tuta kruelo de l' primitivaj instinktoj. Precipe komandantoj hispanaj kruel-agis. Tiaj "kultur"-agoj estas konservitaj en fotoj, kiujn posedas la legianoj. En malmoralajn abismojn estas trenataj la pli altrangaj legianoj kaj trovas ŝajne sadisman kontentigon en tio. Okaze de ŝajna ribelo estis mortpafataj dekduo da ĉiunaciaj anoj. Tri junajn germanojn trafis sama sorto en Ben dib Melilla. Tri pliaj estis punataj per 12—15-jara punlaboro. Post jaroj estis pruvata ilia senkulpeco kaj ili estis liberigataj sen iu ajn kompenso.

La servo en la legio daŭras 5 jarojn... ekskluzive punoj, egale, ĉu ili estis long- aŭ mallongdaŭraj. Estas tre malmultaj, kiuj povas forlasi la legion kiel sanuloj. Penegoj, malsano, vundoj, absurdaj punoj zorgas pri ruinigo. Tion pli kaj pli sentante Volf ne malesperis, sed laboris senlace por sia liberigo. Post dufoja vundigo, ree provitaj forkuroj, grava malsaniĝo ĝis detruo de por la vivo gravaj organoj oni permesis finfine al li maldungiĝi. La germana konsulejo en Madrid helpis lin reveni hejmen per pruntedono de 82 mk. g. je kondiĉo de *tuja* repago post la reveno. Cetere la germana ŝtato fermis la varb-oficejon nur en aŭgusto 1924, post senĉesaj postuloj de sukcesaj forkurintoj. Nur tiel estas klarigeble, ke el 2000 junaj viroj germaniaj mortis pli ol 1800 en la legio.

Per la packontrakto Versaja la kontrakto rilata al la "fremdula legio" estas plilongigita je 100 jaroj. Sed por forigi tiun malbonon, necesas forigi ne nur tiun ĉi leĝon; necesas forigi ĝian radikon; kaj tiu kuŝas en la socia mizero, en kiu vivas milionoj da proletoj.

Je nomo de Karl Volf — Valter Ernst (15 015).



FAKTOJ SEN KOMENTOJ

Parolfilmo, lingvoproblemo kaj nacia intereso

Antaŭ kelkaj tagoj okazis sensacia debato en la brita parlamento (Ĉambro de Komunumoj), kiam iu konservativa deputito demandis la komerc-ministron, kion li intencas fari por malpliigi la importon de usonaj parolfilmoj k por protekti la anglan lingvon, tia kia ĝin parolas la angla popolo. — La ministro respondis, ke ekzistas protektleĝo por la brita filmindustrio k ke li ne havas intencon limigi rekte la importon de l' usonaj parolfilmoj. Rebatis la deputito, ke la leĝo montriĝis neefika, k ĉu ne estus utile ion fari por protekti la britan lingvon k kulturon en tiu ĉi lando. Aplaŭdoj de l' kunvenintaro. Post defendparoloj de l' ministro alia deputito postulis garantiojn pri la filmkvalito. Fine laboristpartiano demandis ironie: "Ĉu s-ro ministro opinias, ke skoto estas kvalifikita por havi juĝon pri tio, kio koncernas la anglan lingvon?" — "Sed certe!" respondis la ministro, kaj la interpelacio finiĝis en ĝenerala gajemo.

Ĉirkaŭ la liberpenso en Hispanio

Evidentiĝas, ke inter la tielnomataj "konsciaj", kontraŭreligiaj personoj en Hispanio la plimulto ankoraŭ preferas doni sian monon k siajn infanojn al la klerikalaj lernejoj anstataŭ al institucio, kiu alportas lumon al la estonta generacio. Mi ĉeestis en urbo, kie vere konsciaj K-doj starigis *laikan lernejon* per grandaj oferoj. Nun ili apenaŭ povas pagi la instruiston pro manko de geinfanoj en la lernejo! Verdire oni ne povas kulpigi la en malklero tenatajn laboristojn, se oni observas la malluman agadon de la politikistaĉoj de l' reganta klaso, kiu aplikas ĉiajn rimedojn por trompi la popolon. Ĉiu politiko baziĝas ja sur la katolikismo en tiu lando, kie pastroj ricevas altajn salajrojn k pensiojn, dum maljuniĝintaj, ne plu laborkapablaj laboristoj ricevas preskaŭ nenion: 1 peseton tage, per kiu ili apenaŭ povas aĉeti sufiĉe da pano por ne malsatmorti. *15 316, Sabadell.*

Nordrusa vilaĝa ŝvitbanejo

Post la vilaĝo, sur la bordo de l' rivereto, vi povas vidi kelkajn strangajn konstruojn, lokitajn tute sen ia ordo. Tio estas banejoj.

Ĉiu banejo apartenas al 1—3 familioj; tial vilaĝo el 50 mastrumoj havas nepre 15—20 banejojn. Komunaj tutvilaĝaj banejoj forestas. Sabate la virinoj devas forlasi sian ĉiaman laboron kaj perdi la tempon por hejti proprajn banejojn.

Kompreneble, 2—3 malriĉuloj ne povas havi bonan banejon; tial iliaj konstruoj estas ekstreme mizeraj. La plafonon vi povas tuŝi per suprenlevita mano. Por eniri tra la pordo, vi devas nepre klini la kapon. Vi devas senvestiĝi aŭ en la ŝvitejo mem, aŭ en la vestiblo, kiu iufoje tute ne havas pordon nek eĉ murojn (nur plankon kaj tegmenton — kaj nenion pli):

La forno estas ŝtona; kamentubo ĉiam forestas, kaj la fumo foriĝas tra trueto en la muro aŭ tra la malfermita pordo. Akvo varmiĝas en tineto per tien ĵetitaj brulvarmigitaj ŝtonoj.

Veninte banejon, la kamparano senvestiĝas kaj kuŝiĝas sur la "polok"-on — ligna altaĵeto sub la plafono, kie la aero estas pli varmega ol malsupre (kvankam eĉ malsupre estas tre varmege!). Ĉi tie li sin batas per betula balailo, ĝis li estos tute kovrita per ŝvito. Post tio, li rapide sin lavas (dank' al la balailo la tuta malpuraĵo foriĝas tre facile) — kaj somere kuras en la rivereton, kie li sin banas. Estas kelkaj amatoroj, kiuj sin lavas en la rivereto eĉ vintre aŭ por kelkaj sekundoj kuŝiĝas sur la neĝon. Antikvatempe tiel agis tre multaj, sed nun la plimulto estas malpli eltenema. Tamen mi, tute ne estante sanega, mem eksperimentis kelkfoje la neĝkuŝadon — kaj ne malvarmumis. Nur post tia eksperimento, oni devas nepre reveni banejon kaj tie sin varmigi dum kelkaj minutoj. Certe, al delikata urbano mi neniam konsilus tiel agi!

Nikolao Usov, vilaĝo Doriŝĉi.

---

objekto formiĝos el 3 nombroj, kies ĉiuj ciferoj havos samtempe signifon de difinitaj konsonantoj, silabataj kun neŭtralaj vokaloj (a, e, i), kiuj ne havas signifon de ciferoj.

La konsonantoj kun **a** montros numeron de klaso, la konsonantoj kun **e** montros subklason aŭ genron k kun **i** montros specon. Ekz. 2'7'9 nomas aĵon de dua klaso, sepa genro k naŭa speco k prononciĝas *daĵeli,* se 2 = d, 7 = ĵ, 9 = l. Kiam sama konsonanto ripetiĝas, tiam (por fari la nomon pli mallonga k belsona) oni metu solan senkonsonantan vokalon antaŭ la ripetiĝanta silabo por montri kiomfoje ĝi ripetiĝas. Tiel metata vokalo same devas havi signifon de difinita cifero. Ekz. la kvarcifero 3333 prononciĝos *ira* (se i = 4, r = 3) anstataŭ la multsilaba *rararara;* la nomo 3'6'555 prononciĝos *raseeki* anstataŭ la maloportuna *rasekikiki* (se 3 = r, 6 = s e = 3, k = 5). Nombran signifon de konsonantoj k vokaloj (kiam la vokaloj uziĝas nur por montri la ripetiĝojn) montras jena tabeleto:

n	1	j	s	6	u
d	2	a	ĵ	7	ja
r	3	e	c	8	jo
ĉ	4	i	l	9	ju
k	5	o	f	o	je

Nomojn de objektoj el aliaj fakoj (ĥemio, geografio, mineralogio) oni povas formi per ciferoj, kiuj montras iliajn plej karakterajn ecojn, ekz. por ĥemielementoj — uzu nombrojn de atompezoj aŭ numerojn (lokojn) iliajn en perioda sistemo, por geografinomoj — latitudojn ktp.

Kiu parkerus tian nomon, tiu samtempe k aŭtomate encerbigus scion pri ĝia plej karaktera eco. Nunaj multvortaj nomoj en multaj priskribaj sciencoj same malhelpos ilian pluan progreson kiel antikvaj priskriboj de formuloj malhelpis progreson de matematiko, salte progresinta nur post enkonduko de pli mallongaj k oportunaj simboloj. (Daŭrigota)

Esperanto-Servo

N-o 22 — 4-a jaro Gvidanto k kompilanto: O. BÄSSLER, Ebermayer-Str. 8, I, Leipzig C 1 (Germ.) 27. Februaro 1930

EL PERSIO

$ kaj £

151 (Esp.-Servo.) Lastan tempon Persio suferas pro kurzŝanceliĝoj de eksterlandaj valutoj, ĉefe de la usona k angla. Ekonomia krizo evidente sufokas ankaŭ la kapitalistan Anglion. Sed tiu lasta, por reakiri la perditan kurzdiferencon en kapitalo enmetitan por usonaj akcioj, estas devigata siavice kun beno de "Laborista Partio" sufoki la Orienton. Kiel ili sufokas — ĉu fizike? Ne! Ili sufokas tute delikate, per "civilizitaj manieroj". Ili lerte k arte plialtigas la kurzon de tiuj valutoj. "The Imperialbank of Persia" jam kutimis, ĉiutage pli-altigi k hodiaŭ jam atingis jenan staton: $ = 13 k £ = 63 persaj kranoj ($ = usona dolaro; £ = angla funto sterlinga). Tio signifas, ke en daŭro de unu lasta semajno la kurzo de persaj kranoj falis pli ol je 30%; tia fakto neniam estis konstatebla antaŭe en nia vivo. Ĉar Persio estas lando importanta — speciale por bagatelaĵoj k luksaĵoj — oni devas kompreni la rezulton de tiu pli altigo de kurzoj je $ k £. Anstataŭ batalo de la persa registaro kontraŭ falo de propra ŝaĥa valuto, ĝi nenion faras por haltigi importadon de luksaj aŭtomobiloj alvenantaj kvazaŭ ĉiutage pocente. La vivo pli-kariĝis ĝis maksimumo — por laborista klaso restas nur malsato k mizero. — La monda kapitalismo travivas krizon, kiu malbonigos la staton de l' laborista klaso, tio signifas, ke malproksimiĝas la komencaj tagoj de la fino de l' kapitalisma reĝimo . . . *B. Hajrapetjan, Téhéran.*

EL AŬSTRALIO

Pri la klasbatala fronto

152 (Esp.-Servo.) En urbo Pert (Nova Sud-Kimrio) paradis la laborista defend-armeo ĉe la "Aberdare"-parko. Tiu manifestacio unuigis ĉ. 1000 ministojn. La laborist-defendantoj elektis kiel komandantojn antaŭajn soldatojn. Formiĝis poste ankoraŭ alia bataliono. Policistoj patrolis en la parko, sed ne kuraĝis kontraŭagi k malhelpi. — En la ĉiutaga gazeto "West-Aŭstralian" aperis jena ĵuro de la laborist-defenda armeo sub la lozungo "proletoj ĉiulandaj unuigu vin": "Mi (la defend-armeo) celas unuigi la proletajn defend-armeojn k solene ĵuras, protekti la proletaron kontraŭ armitaj k aliaj atakoj flanke de la kapitalista klaso. Tial mi neniam konsentos, ke mi aŭ miaj infanoj partoprenos ĉe kapitalistaj militoj kontraŭ proletoj de aliaj landoj. Kiel proleta defendarmeo mi promesas, subteni disĉiplojn al mi imponantaj. Se mi perfidus la fidon donitan al mi, mi ricevu malestimegon de la tutmonda proletaro." — Dum juĝ-proceso pro striko de ministoj ĉe la "Rothbury"-minejo okazis interesa dialogo inter ĉefjuĝisto k ĉefadvokato, dum kiu la lasta klare esprimis, ke li rifuzas respekti leĝojn kontraŭproletajn, kiam temas pri defendo de vivinteresoj de l' laboristoj. — La klasbatala fronto ankaŭ en Aŭstralio koncentriĝas . . . *(1443.)*

EL ANGLIO

180 ministoj monpunitaj

153 (Esp.-Servo.) Pro forresto de laboro la 26-an de novembro ĉe la "Bishop Med'lham"-minejo, sescent ministoj estis monpunataj de la entreprenistoj Dorman, Long k kompanio. Por sia defendo la ministoj deklaris, ke per la forresto ili esprimis sian simpation kun ministo Livett, ano de la sama sindikato, kiu estis mortigita la antaŭan tagon en najbara minejo. "Laŭ la mineja kontrakto" diris la juĝisto "nur estas permesata lasi tiun minejon senfunkcie, kie la morto okazas". 180 laboristoj de la unua minejo estis kondamnita al monpuno de po dekkvin ŝilingoj, dume la ceteraj devis pagi la kostojn de la proceso . . .! *D. E. L. (8502).*

EL ITALIO

Malamiko ĉe la landlimo?

154 (Esp.-Servo.) La itala landlimo estas daŭre k akurate gardata. Ĉu oni timas ekaperon de malamika armeo? Ne, oni atentas al . . . italanoj, krimuloj kompreneble. Jen kelkaj el lastaj arestoj. — Gardostarantoj ĉe alpa montaro arestis junan virinon. Ŝi "konfesis" sian intencon, transiri la limon por iri Francion, kie la edzo atendas ŝin. La "kulpulino" atendas en malliberejo sian vican juĝon. — Oni trovis virinon, morta jam de pluraj tagoj. Eble ŝi intencis iri eksterlanden, sed neĝado sufokis ŝin. — Lastatempe la polico estis informita pri nelegala migrado trans "Frejus"-montaro. Du policistoj sukcesis intermiksi sin en la partoprenantaro k en oportuna momento . . . la domo estis ĉirkaŭata k ĉiuj arestitaj. — Ofte tra la silentaj montoj pafado eksonas; gardistoj rajtas pafi, se forkurinto ne obeas al la unua ordono. — Pri ĉi-ĉio publike raportas ĉiutage la ĵurnaloj . . . *Italano.*

Interesa statistiko

155 (Esp.-Servo.) La nombro de vojaĝantoj per fervojo en Italio malkreskas. Sume la italoj vojaĝas nur trifoje dum unu jaro. La ĵurnaloj ploras pri tiu fakto, tio estus bedaŭrinda afero, ĉar italanoj jam estis la plej famaj vojaĝantoj k esploristoj. Tamen oni rajtas dubi pri la statistiko, ĉar certe en ĝi ne estas entenitaj specialaj vagonaroj por transportado de "figurantoj", kiuj pagataj elementoj estas necesaj por demonstradoj por la Duce k aliaj ŝovinistaj paradoj. *Italano.*

EL USONO

Perfidulo mortis en mizero

156 (Esp.-Servo.) Pat Nash, iama policano en urbo Ĉikago, antaŭnelonge mortis en mizero. Li havis 72 jarojn. La kadavron oni trovis en subtera etaĝo de laborista loĝejo. Kiam oni trovis la kadavron, ĝi estis vestita plej ĉifone. Postmorta ekzameno montris, ke la morto estis kaŭzita de malvarmo. Pat Nash aperis ĉe proceso, kiu sekvis la bone konatan "tumulton de Fojnvend-placo" en Ĉikago en jaro 1886, kie li fiservis kiel atestanto kontraŭ akuzitaj anarkistoj. Dum la tuta okazintaĵo, de bomb-ĵetado ĝis pendigado de l' viktimoj, li ludis tiom gravan rolon por la burĝaro, ke oni lin honoris per heroa statuo. La statuo troviĝas en parko Garfield en Ĉikago (Usono). Nun, en lia maljuneco, Pat Nash estis forgesita de la burĝaro, al kiu li donis sian fidelan helpon. Li estis eksigita el policistaro pro maljuneco k forpelite nun mortis en soleco. La "heroa statuo" ne savis perfidulon de mizera morto . . . *T. Litzen (15 280).*

EL NEDERLANDO

Artefarita pluvo?

157 (Esp.-Servo.) En Nederlando okazis eksperimento, por artefari pluvon. Estas s-ro Veraart, kiu jam longan tempon esploris, kiel li povus okazigi pluvon en tempoj, kiam oni bezonas ĝin por la agrikulturo, precipe por tiuj regionoj, kie nur malofte pluvas. Por atingi sian celon, s-ro Veraart uzis polvorigitan glacion malvarmegan, kiu havas temperaturon de 109° C. sub nulo. Por atingi tiun intensan malvarmon, oni uzas likvan aeron je temperaturo de 190° C. sub nulo. La glacipolvon oni kunportas en flugmaŝino k disĵetas ĝin super la nuboj, por kondensi la akverojn, k teorie la rezulto devus esti pluvo . . . Sed la unuan fojon la eksperimento malsukcesis, ĉar la aero ne estis sufiĉe nuba. Tuj diris la kredantoj je dio, ke dio malhelpis, ĉar nur dio posedas la povon k potencon, regi la naturon, k ĉiuj, kiuj volas superregi la volon de la pova dio, estas fihomoj k krimuloj . . . *SAT-peranto en A.*

RESPONDA PARTO

Vane ni atendis ĝis nun certajn kritikojn je ĉi tiu paĝo. Nin tre interesas *viaj* opinioj k proponoj, por plej trafe k bone utiligi ĉi spacon en "S-ulo".

Multaj raportoj alvenis, do iom paciencigu, se via ne aperis ĝis nun.

SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 13 REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT N-o 13
Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22. Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12.

VINTRO-SUNTURNIĜO

(Parolado je la vintro-sunturniĝa-soleno 1929 en Erchaŭzen)

La aŭtuno, kiu alportis ankoraŭ kelkajn belajn tagojn, estas nun finita kaj anstataŭita per la vintro. Jam ĉiam oni ekkonis, ke la vintro kun siaj mallongaj tagoj kaj longaj malhelaj noktoj estas obstina malamiko de la vivo. Jen dormas la naturo; la tero kovras sin per neĝo, kaj plenaj je malespero la senfoliaj arboj etendas siajn branĉojn en la spacon. Multaj birdoj transloĝiĝis en pli varmajn landojn, kaj la postrestantaj pasigas penplene sian vivon. Nokte la ventegoj kriegas sian teruran melodion, kaj la neĝo transformiĝas je malmola glacikrusto. Dum la tago la suno lasas sin vidi nur mallongan tempon malantaŭ nuboj kaj nebuloj. Apenaŭ ĝi estas leviĝinta en oriento, jen ĝi lace malleviĝas en okcidento.

Sed tute aliel estas en malproksima sudo. Tie ĝojigas la suno ankoraŭ dum ne malmulte da horoj la homon per sia luksego, tie lumas la blua ĉielo, la birdoj pepas siajn gajajn kantojn, la naturo diboĉas en floroj, kaj la papilioj flugetas tra la aero.

Sed en la eterna fluado de la okazoj ŝanĝiĝas la tempoj. Dum la terglobo ruliĝas pluen, en sudo devas vintriĝi, sed ĉe ni disfaldiĝas la luksego de la somero. Tiutempe ĉe ni kantas la birdoj siajn ĝojegajn sonojn, kaj la rozoj floras en admirinda belo.

Iam ekzistis tempo, kiam oni ankoraŭ sciis nenion pri la cirklairado de la tero; tiam oni ankoraŭ ne sciis, ke planedoj turnadas sin ĉirkaŭ la suno; tiam oni povis nur admiri en pia timo la okazadon. Infane oni imagis la naturfortojn kiel personojn, kiuj precize kiel la homoj pensas, sentas la orelon, kiuj estetike tuŝas nin ankaŭ hodiaŭ. Ni aŭdas la kanton de la blinda bardo pri la batalo inter lumo kaj mallumo, ni vidas la lumdion alrajdi sur blanka ĉevalo. En altsvingita mano li tenas flamantan glavon kaj bataladas kolereme kun la demono de la nokto. Kiel ĉi tiu demono defendis sin malespere! Sed fine la ŝildo estas disbatita al li, la lanco forfaligita, kaj sian nigran ĉevalon li instigis al forrapido. Ĉiun jaron dum vintro-sunturniĝo ĉe niaj pragepatroj maljuna kantisto kantis ĉi tiun kanton. En profunda kaj pia silento la antikvaj germanoj aŭskultis lin. Poste la praavino, tio estis la plej maljuna virino de la hordo, venigis ŝtipon da seka ligno, kiu kuŝis kaŝita sub oferŝtono. Ĉi tiun ŝtipon ŝi ekbruligis per sia fajroligneto, kaj dume ŝi parolis rimarkindajn preĝojn kaj sorĉofrazojn. Jen ekflamas alten la lumo kaj anoncas en malhela nokto la novan tagon. La tuta popolo, de la junulo ĝis la maljunulo, dancadas ĝojege ĉirkaŭ la fajro. Ĉiam pli vastaj fariĝas la rondoj, ĉiam pli petolaj fariĝas la saltoj, kaj ĉiam pli forte sonoras la kanto je la honoro de l' sundio. De tiu dio, kiu kun la soleno de la sunturniĝo rompas la regadon de la vintro kaj denove donacas pli longajn tagojn al homo . . .

Du jarmiloj nun estas malaperintaj, kaj en malproksima nebulo troviĝas tiu tempo. La homo liberigis sin el la infaniluzio de la pratempo kaj subigis la trompobildojn de siaj sentoj. Li ne plu bezonas la superstiĉon de siaj prapatroj, ĉar li lernis *pensi*. Per senlaca pacienco la esplorantoj serĉas penetri en la sekretojn de naturo, vivo kaj socio. Malfermiĝas al ilia spirito la direkto de la polusoj, la vojoj de la tero kaj ties ŝanĝebla loko al suno. Nuntempe ni scias, kial en alterna dancado la sezonoj preterpasas al ni, kial ni devas travivi la tagojn jen en riĉa florornamo, jen en vintrovestaĵo. La poemojn de la malnovaj majstroj pri la migrado kaj la aventuroj de la sundio ankaŭ ni modernaj homoj povas kunsentante travivi, sed ni envicigas ilin tien, kien ili apartenas: en la regnon de fantazio kaj revoj. Sed se ni volas serĉi la veron, tiuj revoj ne povas esti kompetentaj por ni, tiuokaze ni povas nur fidi sciencon. Per kuraĝa rigardo ekkonas la esploranto la leĝecon de la tutmondo, per la teleskopo li migras en pli kaj pli vastajn malproksimojn, kaj la revo malaperas, kie mezuro kaj nombroj valoras. Ni ne bezonas sopire genui kaj preĝi antaŭ la sundio, ĉar netuŝate de homdeziro kaj homfeliĉo la suno devas plenumi siajn vojojn laŭ eternaj gravaj leĝoj. Ni bezonas nek preĝi nek danki al iuj dioj, ĉar la naturleĝoj, ĉe kiuj ĉia arbitro estas neebla, destinadas tiel devige la vojon de la planedoj kiel ankaŭ la vojon de ĉiu speciala homo de naskiĝo ĝis morto.

Pli ol iu revema kredo firmigas nin la scio, ĉar se ni konas la naturleĝojn, tiaokaze ni povas senĉese plibonigi nian vivon. Ankaŭ ĉiuj produktemaj ideoj estas enŝpinataj en la reto de kaŭzo kaj efiko, kaj konsciante, ke ĉi tiuj ideoj ne senefike pereas, sed grade kulturas la pli altan homon, ni atingas ĝojan, vivjesan, esperplenan mondrigardon.

Por dio tro grandega fariĝis la mondo, kaj ĉiuj homarorevoj postrestas vaste malantaŭ la senfineco. Ne unu, sed sennombraj sunoj moviĝas en tute difinitaj vojoj, nemezureble etendas sin la spacoj, senlima estas la tempo, kaj ĉiu okazado estas eternaj estiĝo kaj pereo. Kie astro malaperas, jen ni jam havas en gigantaj nebularoj la materialon por novaj mondformoj, por novaj sun- kaj planedsistemoj. Kaj en la mastrumado de la ĉio-unu, de la naturo, nia tero estas nur malgrandeta polvereto. Rigardante tiajn dimensiojn, la homo fariĝas tre modesta, la homo, kiu iam kredis sin centro de la universo kaj opiniis, ke nur liajn ĝojojn kaj suferojn kaj animsavon celas la senco de la tutmondo, kiu pro iluzio pri propra grando perdis ĉian mezurkapablon kaj eĉ revis pri du mondoj, kiujn li ambaŭ volus vivmalsate ekkapti. Sed kio estas la homo reale? Ereto da polvo, momento en eterneco!

Malgraŭ ĉio ni ne bezonas perdi nian memkonscion, ĉar la scio ankaŭ suprenlevas nin. Montras al ni, kiel la homo, kiu kiel ĉiuj vivaĵoj fondas sian ekziston sur sunforto, lukte trapenetris en la kuro de la evoluo ĝis sia hodiaŭa alto kaj kiel li daŭre akrigis siajn sentojn kaj intelekton kaj per tio treege superis ĉiujn aliajn kreaĵojn. Per la lingva ilo la homoj povis interkompreni sin kaj tiele starigi la grandiozan konstruon, kiu diferencigas ilin de la bestoj: la fenomenon de la kulturo.

La scienco instruas la homon, organizi sian mallongan vivon, por ke ĝi ne forbloviĝu senutile en la vento, signifoplene per vortoj kaj agoj. Ĉi tiuj agoj transdaŭras en siaj efikoj la vivon de la individuo kaj tiele ŝpinas pluen la ekzistfadenojn. La unue limigita "mi" kreskas je ampleksa homaro-mi, por kiu amo kaj justo ne plu estas malplenaj vortoj. Alligante pli kaj pli novajn akirojn al malnovo, la homo efektivigas pli kaj pli la idealon pri la pli alta homo por estonto, la superhomo-idealon.

Hodiaŭ ni ja estas ankoraŭ malproksimegaj de ĉi tiu celo. En freneza malsaĝo milionoj da homoj dum la terura mondmilito estas mortigitaj aŭ kriplopafitaj, kaj dum la inflacio per senkonsciuloj nia popolo senkuraĝiĝis ĝis malespero. Ne malmultaj konvertas sin je la spiritisma superstiĉo, alkroĉas sin ree al transmonda kredo kaj opinias, per tabloleviĝo interrilati kun la fantomoj de la mortintoj. Preskaŭ ĉiuj eŭropaj ŝtatoj havas debetojn, kaj la tero similas ruinamason. Militoj furiozas ĝis la hodiaŭa tago, kaj la homa feliĉsopiro estas mokata kiel malsaĝa utopio. Senlaboreco, loĝejo-manko kaj — neforgeseble! — ekspluatado en terura

jugo de la kapitalismo estas hodiaŭ severegaj faktoj.

Malgraŭ ĉio: ni ne volas malesperi, ni neniel lasas al ni forpreni la kredon je la estonta paradizo! Same kiel la suno leviĝas el plej profunda loko al nova supreniro kaj donacas al malhela, malvarma tero novan lumon kaj varmon, kiujn ni ĝoje salutas kiel simbolon de la espero, tiel certa estas por ni socialistoj, ke post ne tro longa tempo nia malĝojego malaperos kaj elkreskos el la cindro de ĉi tiu kruela tempo la vera homeco. Poste la homoj kaj nacioj de la estonta senklasa socio metode kunlaboros en reciproka fido, kaj la pacosuno lumos ilin, malklarigata de nenia nubo. Sed ĉi tiun altan celon ni povos nur atingi, se ni mortigas en ni mem la malnovan, egoistan, malkuraĝan, sklaveman kaj transmondkredeman homon kaj serĉas efektivigi en ni la novan, socian, liberan, ĉimondkredeman homon jam nuntempe. Nur en ĉi tiu signifo valoras por ni la Gete (Goethe)-citaĵo: Se vi ne tion havas: "Mortu kaj fariĝu!", malklara gast' vi estas sur malhela tero!

Verkis kaj tradukis: *Ernst Bepperling (12896).*

DISKUTEJO

Ĉu ree ni ne devus buĉi la bestojn?

Tre atente k iagrade kun intereso mi legis la artikoleton de K-do E. Dehn en "S-ulo" n-o 278 "Amikeco al bestoj k vegetarismo". Mi tute ne intencas kritiki la enhavon, sed nur esprimi mian pensmanieron k opinion. Mi emas vegetarismon, kvankam mi daŭre nutras min per miksaĵoj el viandoj k legomoj. Same mi ŝatas la bestdefendantojn. Mi mem profunde amas bestojn, des pli ke mi estas kamplaboristo (nuntempe ĝardenisto). Do mi tre bone konas la utilojn de la bestoj por la homaro. Tial mi neniam malbontraktas bestojn sen grava motivo. Kaj kiam mi vidas homon malbontraktanta siajn kvarpiedajn fratojn, mi "laŭ natura leĝo" ree indigniĝas. Tial ŝajnas al mi, ke ankaŭ mi estas bestamiko. Sed rilate al ilia buĉado mi havas opinion, ke necesas buĉi ilin por garantii nian trankvilon, k eĉ tiun de la bestoj mem.

Pripensu, K-doj bestdefendantoj, kio okazus, se oni ekzemple ne plu buĉus la bovidojn? Ili fariĝas maturaj bovoj k laŭ natura leĝo ree naskas plurajn bovidojn. Kiom da bovoj enhavus la mondo post cent jaroj? Kaj kie ili nutriĝus? Eble estas simpla respondo: Oni malpermesos al la bovinoj naski idojn. Bone, sed tiel vi ankaŭ suferigas la bovinojn, ĉar la naturleĝo postulas de ili idnaskadon. Ĉu vi jam scias, ke bovinoj suferas multe (almenaŭ laŭ mia opinio de eks-bovgardisto) kiam oni ne plenumas ilian postulon pri pariĝo kun bovoviroj? Ŝi dum preskaŭ 8 tagoj (ĉiumonate) nur kriaĉas k malgrasiĝas. Tiu fakto pruvas, ke ŝi suferas... Certe la bovnaskado pleje suferigas ŝin, sed tio okazas nur unu fojon jare. Male la poŝtuloj al viro renoviĝas ĉiumonate. Sed ĉu vi preferus la lastan suferon? Nu, konsentite. Sed ĉu vi jam scias, ke la bovinoj donas lakton nur post bovidnasko. Do, se malpermesate estus al bovinoj naski idojn, tiam ni ne plu havus lakton! Ĉu la bestprotektantoj estas ankaŭ kontraŭ la trinkado de lakto?

Mi eĉ nekuraĝas imagi la rezulton de la lakt-formalapero, do lasas al la legantaro mem fari la konkludon pri tio. Mia bovid-rakonto valoras nepre por ĉiuj mambestoj. Nu, ĉu do ni ne devas plue buĉadi la aliajn bestojn? Ĉu ni devas lasi laŭ la naturleĝo kreski ĉiujn hundidojn k katidojn ktp.? Se ni permesus tion, nepre post kelkaj jaroj ni ne plu povus trairi la stratojn sen dika bastono aŭ pafilo ĉe la mano. Kaj kion diri pri la sovaĝaj bestoj, ekz. sovaĝaj kunikloj? Kiom ofte mi mem malbenis ilin vidante ilin difekti multvalorajn legomkreskaĵojn! Feliĉe estas permesata ĉasbuĉado. Aliel mi ne scias, ĉu estus eble planti multajn variajn vegetaĵojn, kiuj tamen devas formi la nutraĵon de la Gek-doj vegetaranoj... Certe ekzistas ankaŭ bestoj, kiujn oni neniam devus buĉi, ekz. alaŭdoj, hirundoj k multaj aliaj birdetoj, kiuj estas tre utilaj por la homaro, ĉar ili malaperigas miliardojn da... aliaj bestoj! — insektoj k mikroboj.

Mi ankaŭ protestegas kontraŭ buĉado al kelkaj dombestoj, kiel ekz. ĉevaloj, kiuj post 10- aŭ 20-jara peniga laboro estas kondukataj al bov-batalejo, kiel okazas en Hispanio. Certe tiaj agoj ne estas indaj je la homa civilizo...

Sed buĉi bestojn konscie k racie mi opinias ne malhonora por la homaro: Eĉ ĉar mi konsideras la bestojn kiel niajn denaturajn fratojn, por mi estas tute nature, ke la homoj havu la kuraĝon buĉadi la troan aŭ malsanan homidon — — Sed konsciante pri la racieco k malnovaj encerbigitaj kutimoj k moroj de la legantaro, mi ne volas insisti pri similaĵoj. *Coll (7998).*

Kiel rilati al militservo?

Laŭ K-do K. K. (Latvio), en n-o 275, ĉiuj devus militservi por alproprigi al si militajn sciojn por la proleta movado. Mi neas, ke la klasbatala movado estus pli riĉa, se ĉiuj proletoj militservus. Kompreneble iuj (ne ĉiuj) vilaĝanoj povus profiti el tio, lernante skribi k legi. Sed ankaŭ ili prefere irus hejmen, ĉar dum kazerna tempo ĉiuj devas submetiĝi k obei siajn ĉefojn, kvankam tiuj lastaj ofte estas malpli kleraj ol la simplaj soldatoj mem. Ĉu la latvia militservo estas pli dolĉa ol tiu en ceteraj landoj? Eble; sed verŝajne ne pli dolĉa ol tiu en Hispanio: tamen mi neniam aŭdis nek legis, ke proleto rilatas gaje k dankeme al la militserva tempo kiel K. K. Ĉu vere nur per tio li sukcesis interrilati kun samekspluatataj homoj? Ĉu en Latvio tiutempe ne ekzistis sindikatoj nek aliaj klasbatalaj societoj? Sed eble K. K. neniam legis gazetojn, ĉar aliel li ekscius pri la ekzisto de tiaj organizoj (eĉ burĝaj gazetoj raportas pri ili). Mi persone (ne militservinte) kiel multaj viroj malamas la kazernan vivon k tiun malnoblan institucion, kiu regas per forto, obeemigo k disciplino. Mi indigniĝas kontraŭ homoj, kiuj nomas sin ĉefoj k ankaŭ kontraŭ iliaj obeantoj. Multfoje mi vidis militekzerci soldatojn k vidis, kiel serĝento aŭ alia instruanto frapis en vizaĝon al nekapablaj, senhelpaj homoj, filoj de l' popolo. Ĉu en Latvio milit-instruantoj faras ion similan? Ĉar vere, se K. K. ricevus ian malagrablan vangofrapon, li kredeble ne estus tiom dankema al tiu fiinstitucio.

11 586 (Hispanio).



LA UNUA NUMERO DE

SENNACIECA PEDAGOGIA REVUO ĴUS APERIS.

Jen mallonga cito el la enhavo de tiu 32-paĝa ilustrita numero:

Nia programo. — Nova pedagogio: Kieva teatro por infanoj. — Eksperimento de brita pedagogo. — Sur edukista batalfronto: Mis-instruo de historio ĉe la Usonaj lernejoj. — Socialisma konkurado. — Tutmonda Esperanta Pedagogia Servo: Korespondaĵoj el Aŭstrio, Britio, Francio, Germanio Jugoslavio, Latvio, Polio. — Edukisto kontraŭ pastro: Katolika pastraĉo. Karl Marks k . . . eksigo el lernejo. — Antaŭ 20 jaroj hispanaj pastroj murdis Ferrer. — Por edukistinoj: Ĝenerala bildo de l' edukistina situacio en tutmondo. — Kondiĉoj de instruistinoj en Britio. — La francaj instruistinoj. — Demandaro. — Ni gestudentoj: Studenta vivo en Japanio. — Prusiaj gestudentoj perdas memadministro-rajton. — Pri latvia universitato. — Nia SAT-edukista sekcio: Ni k la neŭtraluloj. — Ligo per esp o inter blankrusaj k francaj geedukistoj — Kontrakto pri soc. konkurado. — Kieva geinstruistaro por esp-o. — La angulo de l' interhelpo.

SAT-ANOJ, RAPIDU ABONI LA GAZETON,

kiu estas ja la plej malkara el ĉiuj esp.-gazetoj; ĝia abonprezo jare 1/2 usona dolaro aŭ egalvaloro. — Abonpago sendu al Admin. de SAT, Colmstr. 1, LEIPZIG O 27. Sovetianoj sendu al CK SEU, MOSKVO, Poŝtkesto 630.

TRA ESPERANTIO

EL LA REDAKTEJO

Ni ricevis el Latvio poŝtkarton kun jenaj linioj: "Koncerne pliampleksigon de "S-ulo", mi tute tion ne deziras, ĉar jam ĝis nun ofte la enhavo estis neinteresa k, cetere, mi havas pli multe da alia legaĵo k lernindaĵo ol "S-ulo" (K. K. 11 321)." Ankaŭ laŭ opinio de alia flanko 8-paĝa gazeto sufiĉus, ĉar oni ne havas tempon por legi tiom da esperanta teksto.

Ĉu ni sekve rezignu klopodi pri konservo de 12-paĝa "S-ulo", kiun ni nun jam de preskaŭ unu jaro liveris al niaj legantoj seninterrompe? Ni havas kelkajn motivojn laŭ ni sufiĉe konsiderindajn por kontraŭdiri la suprajn opiniojn "defetismajn": 1. kontraŭstaras la kontent-esprimo pri la 12-paĝa gazeto de multaj el niaj legantoj k aktivaj SAT-anoj; 2. de propaganda k varba vidpunkto 12-paĝa multpapera gazeto pli impresas k efikas sur varbotojn k kontraŭulojn ol 8-paĝa kajero; 3. per 12-paĝa gazeto ni pli facile povas kontentigi la diversajn dezirojn rilate al la enhavo de nia multflanka legantaro ol per 8 paĝoj. Ni ja ne supozas, ke *ĉiu* tralegas *ĉiujn* artikolojn en la gazeto. Sed almenaŭ ĉe 12 paĝoj ĉiu havas pli grandan elekton inter la artikoloj; li povas eltrovi tiujn, kiuj plej multe rilatas lin k tial plaĉas al li. Ĉe nur 8-paĝa gazeto tio ne estas ebla; k 4. (tio estas samtempe respondo al la supra "kritiko" de K-do 11 321) kunlaborado de vastaj rondoj el niaj K-doj fariĝas iluzia ĉe 8 paĝoj, ĉar pro spaca limigo iliaj artikoloj ne plu trovos lokon en "S-ulo". Tiu punkto estas treege grava por la tuta disvolviĝo de nia movado. K-do 11 321 mem profitis dufoje dum la plej lasta tempo la akceptemon de l' "S-ulo"-redakcio por loki siajn artikolojn. Li do montris, ke li ne nur povas negative kritiki, sed ankaŭ pozitive kunlabori! "S-ulo" unuavice estas organo oficiala de SAT k tial antaŭdestinita por efektivigi la en Statuto de SAT fiksitan punkton pri instruado k klerigado de l' SAT-membroj... Vi mem kalkulu, kiom da loko restas por tiu tasko deprenante 1 paĝon por la fakoj (konsentitan al ili ĉe la kongresoj), 1 paĝon por la Esp. Informservo (konsentitan ĉe la lasta kongreso) k almenaŭ 3 paĝojn por la neeliminebla "Tra Esperantio" kun sciigoj pri stato de la movado k anonca parto!

Ni bedaŭras, ke la supra kritiko estas absolute negativa.

Tute alia estas la kritiko de K-do 8404 el Svedio. Li deziras trovi en "S-ulo" pli da bildoj, pli da mallongaj viglaj artikoloj, pli da materialo facile legebla de simplaj laboristoj k ne nur de studentoj. Li deziras trovi artikolojn verkitajn kun pli da ĝojo k bonhumoro k pli da *amo*. Tuta fasko da sugestoj k instigoj! Provu ni iagrade realigi la deziron de nia K-do, laborante en tiu direkto kun la helpo de bonvolema aro da multspecaj k diverstalentaj kunlaborantoj, al kiuj ni vokas (ne la unuan fojon!): Verku koncize, k ne pri bagateloj, nek abstraktoj, sed verku *kiel eble plej interese k vigle!*

Tre volonte ni ja akceptas k konsideras pozitivajn konsilojn, sugestojn, subtenon. Kaj serioze farataj kritikoj akiras precipe valoron, se ili estas akompanataj de provoj de pli bona efektivigo, se la kritikantoj mem kunlaboras en la gazeto por doni al ĝi tiun aspekton k tiun formon, kiu ĝin faras plej leginda.

N. B.

250
ABONANTOJ
mankas ankoraŭ al "S-ulo" por atingi la minimume bezonatan nombron da 4000. Ni proksimiĝas tiun nombron, sed tro malrapida k necerta estas la antaŭeniro.

Zorgu vi, Gek-doj,
per streĉa ekago, ke dum la venontaj semajnoj ni povu disaŭdigi tra la mondo, ke "S-ulo" akiris la

4000-an ABONANTON!

NOVA ELPAŜO KONTRAŬ ESPERANTO

K-dino N. K. Krupskaja (edzino de Lenin) en n-o 24 (1930) de ĵurnalo "Komsomolskaja Pravda" (Komjunulara Vero), en sia artikolo pri infanara libro i. a. skribas pri la internacia lingvo esp-o jene:

"... Lingvo estas ia vivaĵo, ligita kun travivaĵoj de homoj, iliaj pensoj, ilia moraro. La lingvo ŝanĝiĝas konstante. Apenaŭ kaptebla translokigo de vortoj, dum rapidparolado elfalas ia litero k jen nova vortfarado aperas. Lingvoscienculoj povas rakonti pri la vivo de lingvo k ĝia disvastiĝo multe da interesaĵoj. La lingvo de ĉiu popolo entenas en si tuton de ĝi travivitan. Certe, lingvo ŝanĝiĝas ne nur historie. Ĉiu socia klaso havas propran lingvon; la lingvo en urbo forte diferencas de tiu en kamparo ktp.

Nepre pro tio, ke lingvo seninterrompe estas ligita kun travivaĵoj de homoj, kun ilia moraro, kun ilia mondkompreno estas malfacile krei artefaritan lingvon similan al esp-o. Tiu ĉi lingvo kreita kabinetmaniere, sed ne kreskinta el la vivo, ĉiam estos mizera, ĉiam estos morta, malvarma, malriĉa k kompatinda. En plej bona okazo ĝi taŭgas nur por interrilatoj, sed estas malfacile imageble, ke homoj iam konvinkus en io unu la alian *per* esp-o, ke junulo dirus siajn unuajn vortojn de l' amo al sia amatino per esp-o, ke patrino kantus al sia ido lulilkanton per esp-o. Estas tre malfacile imagi al si tion. Internacian fratiĝon oni forĝas nur dum batalo, *intimigas nur komuna batalo, sed ne artefarita lingvo.*"

Gek-doj, skribu multnombre protestojn kontraŭ tiu propagando, kiu sin bazas nur sur nekompetento en esp-o de la aŭtorino. La adreso de tiu ĵurnalo estas jena: USSR, *Moskvo*. M. Ĉerkasskij, 3/4 al red. de "Komsomolskaja Pravda".

Gek-doj, kiuj ne volas aŭ ne povas skribi oficialan adreson sur koverto, skribu al K-do A. Nikitin. *Uljanovsk-Zavolĵie,* Leningradskij pr. 9, kv. 2.

SAT-ano 12 408.

ĈU EBLAS?

Ni bone scias, ke ĉiam kreskanta esp. movado bezonas ĉiam pli fortan monprovizon. Tial ni SAT-anoj devas helpi al nia sola tutmonda esp. organizo kolektadi monon por eldon-agado k. a. bezonoj. El la raporto de l' 9-a Kongreso ni vidis, ke la libroj eldonitaj de SAT eĉ nur po 2000 ekz. estas malfacile vendeblaj pro diversaj kaŭzoj. Ankaŭ ne tre bone statas la afero pri la periodaĵoj. Mi tial proponas eldoni SAT-loterion, per kiu gajnas tiel SAT kiel ankaŭ SAT-anoj. La loteri-biletoj povus esti vendataj ankaŭ al div. proletaj organizoj. Kiel gajnopago servos SAT-libroj, senpagaj abonoj ktp., ankaŭ naciaj lernolibroj eventuale, post interkonsento kun koncernaj LEA-oj. La loteribiletoj ne estu tro karaj, ekz. 0,50 mk. g. po bileto. La lotumo okazu je dato fiksita de l' Adm., sed ne pli malfrue ol post 4—6 monatoj, deire de la eldono. Tiel pli rapide k por multaj pli malkare disvastiĝus niaj libroj, k la Eldonkooperativo povus daŭrigi eldoni pli intense novajn librojn.

V. Fuchs, Volsk (USSR).

Korektoj. Petis nin K-do 11 321, korekti en lia art. n-o 277, p. 190 pri grundo en Latvio: "ekzistas almenaŭ duobla nombro da *militkripluloj* laŭ % da enloĝantoj ol en najbaraj ŝtatetoj"; legi "arendi" (anst. atendi; lin. 28 de tiu art.). Sed tia vorto ne estas trovebla en vortaroj k nekonata ĉe la Red. La aŭtoro devus pli klare esprimi sin! — En la artik. "La tuta mondo en libroj" (n-o 279), legu anst. Ŝrengel "Ŝrenzel".

Kiel estis akceptataj en Francio du alilanduloj

La 10. februaro mi ricevis poŝtkarton de du SAT-anoj, Bergman (15 650) k Cederholm (15 649). Tiuj du svedaj K-doj, kiuj vojaĝas tra la mondo, sciigis al mi pri ilia trairo en Lil (Lille). Bedaŭrinde ili ne precizigis notante la tagon de l' alveno. Tamen, ili devis supozi, ke SAT-anoj ja laboras. Sekve mi la 12. febr. ne estis hejme, kiam mia edzino telefonis al mi pri la alveno de l' K-doj en Orŝij (Orchies). Bergman ankaŭ telefonis, k mi respondis, ke mi ilin atendas ne en Orŝij, sed en Lil, kie mi laboras, ĉar mi ne povis esti en Orŝij (30 km. de Lil) antaŭ la 21-a horo.

Kiam mi rehejmiĝis, la edzino diris al mi plorante: "Viaj du amikoj estas arestitaj k en la urba malliberejo". Tuj mi kuris al la ĝendarmejo, kie la policistoj konfirmis, ke du svedoj ne scipovantaj francan lingvon estis arestataj, ĉar ilia pasporto ne taŭgas.

Laŭ mia peto oni kondukis min al la K-doj, kiuj ankoraŭ demandis pri la kaŭzo de l' aresto. Ili ja vidis en Bruselo la francan konsulon. Mi interpretis tion al la ĝendarmestro. "Povas esti," tiu diris, "sed mankas korpmezura folio en ilia pasporto." Mi petegis lin lasi loĝi la K-dojn ĉe mi, prenante la respondecon pri ili. Li rifuzis. "Morgaŭ matene vi povos alporti al ili manĝaĵon." Je la kvina matene sekvantan tagon mi estis ĉe la pordo de l' ĝendarmejo, sed nur je la sesa policisto malfermis. Kaj la du K-doj estis kondukataj ĉe la prokuroron al Due (Douai).

For landlimojn k pasportojn!

Liégeois (12 783).

ŜERCO?

Ĉu oni povas korespondadi serioze? Tia estas la demando, pri kiu mi deziras paroli en "S-ulo". Mi provis korespondi k neniam sukcesis.

Miaj riproĉoj iros unue al K-dinoj. Mi deziras koni la vivmanieron de la virinoj en Sovetio k aliaj landoj. Kompreneble mi adresas mian peton al K-dino (Mi skribis jam al kvar K-dinoj). Sed verŝajne mi estas tro scivola: La unua respondo estas ĉiam tre mallonga k malmulte interesa pri tiu temo, sed kompense oni petas de mi portreton. Mi konsentas k sendas foton. Ĉar miaj korespondantinoj estas sendube tre junaj, k ĉar mi jam estas 40-jara barbulo, adiaŭ!! Mi skribas unu-, dufoje, sed neniu respondo venas, aŭ oni respondas per simpla karto, ke oni skribos . . . baldaŭ, sed baldaŭ signifas neniam.

Mi konsentas, ke oni ne povas paroli pri amo, kiam oni estas 17-jara k la "alia" estas 40-jara, sed neniam mi proponis tian aferon!! Kaj ankoraŭ neniam mi vidis en "S-ulo" post la nomo de K-dino, ke ŝi deziras skribi pri amo! Estus ĝentile respondi almenaŭ unufoje detale pri la demando . . . sed mi ekvidis, ke tiu peto estas troa.

Same mi skribis al du kluboj (unue en Sovetion, due en Svedion, Göteborg), k neniu respondis. Tial estas finite. Neniam plu mi petas korespondadon. Ĉu ne estas ŝerco?

Troseriozulo (179).

MALGRANDAJ NOTOJ

Radio-Ĥarkov!

Depost 1. februaro ne plu okazas ĉiutagaj esp. disaŭdigoj. Ĉiu*sabate* je 22.10 h. laŭ MET (SAT-sektoro 1), t. e. je 21.10 h. laŭ okcidenteŭropa tempo (SAT-sektoro 0) estos disaŭdigata dum 30 min. esp.-lingva "Radio-Revuo" pri politika, ekonomia, kultura vivo en Sovetio. Ĉiuj K-doj estas petataj alsendi amase leterojn respondante, 1. ĉu sufiĉas esp. disaŭdigo 1 fojon semajne aŭ estas preferinde pli ofte (2, 3-foje), 2. ĉu la tempo estas oportuna, 3. ĉu krom la "revuo" tiu disaŭdigo enhavu ankaŭ muzikon, deklamadon ktp., 4. ĉu la disaŭdigo estu pli ol duonhora, 5. ĉu vi dezirus aŭdi "Internacion" k alian rev. muzikon dum tiu disaŭdigo, 6. per kiu akceptilo vi aŭskultas, 7. kiujn aliajn prisovetiajn temojn vi ŝatus aŭdi, 8. ĉu K-doj el malproksimaj landoj povas aŭskulti, se ĝi okazas per mallongonda sendejo? — Alsendu ankaŭ let. por disaŭdigo. Adr.: *Redakcio Radio-Gazeto, Ĥarkov,* USSR. Skribaĵoj kvitancotaj per radio aŭ (se oni deziras) per poŝto.

Esp. Fako de "Radio-Ĥarkovo".

Invito al konkurado

Ni Minskaj SAT-anoj invitas SAT-anaron en Göteborg, Buenos-Aires, Barcelono, Essen k Lodz al revolucia konkurado. Ni prenas sur nin jenajn taskojn: 1. Pligrandigi la nombron da SAT-anoj en Blankrusio ĝis 85 membroj. 2. Doni al SAT-administracio dum la jaro 30 jarajn (aŭ 120 kvaronjarajn) abonojn por "S-ulo". 3. 20 jarabonojn (40 duonjarajn) al "LNE". 4. Aĉeti por disvendo ne malpli ol 10 ekz. de ĉiu nova SAT-eldono k disvastigi ilin. 5. Helpi al ne malpli ol 3 fabrikoj aranĝi korespondadon kun eksterlando. 6. Ĉiu SAT-ano korespondanta kun eksterlando promesas varbi sian koresp-anton por SAT. 7. Organizi 5-an de majo tuturban ekspozicion de intern. interligo. 8. Helpi al SEU plenumi sian taskon rilate al socialisma konkurado kun Krimeo.

Komisiite: D. Snejko.

(La invito validas por abonoj k membroj de 1. 1. 30 ĝis 1. 1. 31. SAT-administracio estu arbitro en nia konkurado.)

Eĥo el blanka lando

Sciiĝinte pri alvoko en n-o 276 partopreni la "socialisman konkuradon", ni trovas ĝin trafa k garantias jenajn rezultojn ĝis la 10-a Kongreso. Ni komencos tri kursojn kun partopreno de 20 p. El ili 15 devos iĝi SAT-anoj. Same ni devigas nin havigi 5 abonantojn al "S-ulo" k 10 por "La Lernanto". La Gek-doj konsideru, ke ni estas en tre mizera subpremo. Nenia lab. kunveno estas permesata. Ni laboras eksterleĝe. Nun estas 5 SAT-anoj, aliaj formigris aŭ soldatiĝis; 3 "S-ulo"-abonantoj, 1 al "LNE". Nu, ni komencas nian laboron! *Arad-anoj.*

Peresperanta laboro

La Nord-Kaŭkazlanda SEU-Komitato sciigas pri sukcesoj de siaj leteroj kolektivaj, senditaj okaze de 1. aŭgusto 1929 k de 12-jara revolucia datreveno: "La unua letero aperis en multaj kom. ĵurnaloj k gazetoj, sed bedaŭrinde estis sendataj al ni nur 15 n-oj el 8 landoj k ĉ. 30 respondleteroj. Nia let. estis uzata ankaŭ dum amaskunvenoj k elmontrata en lab. kluboj k eĉ ĉe placoj en okcidentaj landoj. En ĉeĥoslovaka "Rude Sever" ĝi estis mallongigita per la cenzuro. Kelkaj ricevitaj ĵurnaloj kun nia letero estis kliŝitaj en ruslingvaj ĵurnaloj. Kliŝo de la letero ankaŭ aperis en hungarlingva kalendaro en Usono. Tiel komencis labori nia Internacia Korespond-Sekcio."

Aptekman (9912), Sidorov (5458).

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

GERMANIO. Dresden. Inter la tramistaro oni okazigas kurson kun 70 p. Por tiu celo la direkcio disponigis instruejon en tramstacidomo. La kurso estas gvidata laŭ la Ĉe-metodo. *(745.)* — *Glauchau.* 2. febr. okazis LEA-distrikt-kongreso (Ercgeb.-Vogtland). K-do Bergsträsser, Zwickau, parolis pri lingvaj demandoj. K-do Lösch estis elektata kiel estro. Proksima distrikttago dum somero en Rodewisch. Posttagmeze raporto de K-do Zimmermann, Ammendorf, pri sia vojaĝo tra Sovetio. *(1745.)* — *LATVIO. Riga.* La fondiĝkunveno de Riga Lab. Esp. Societo okazis 18. jan. Ĉiuvendredaj kunvenoj de 19—21 h. en nova ejo (Gertrudstr. 45-8). Sekretaria adreso: J. Ejabs, *Riga,* M. Kalnu str. 13-12. *(8436.)* — *RUMANIO. Arad.* En ĉi tiu urbo fondiĝis la unua rumanlanda lab. esp. rondo filiita al SAT. Post 15. febr. komenciĝis 3 kursoj. Kunvenejon ni ankoraŭ ne havas. — *SOVETIO. Dnepropetrovsk.* Komence de nov. 29 organiziĝis 3 esp. seminarioj por junkom-istoj, 1 por pioniroj, 1 por studentoj. Tuturba SEU-kunveno okazis 23. jan. Ĉeestis proks. 180 K-doj. Tagordo: signifo de esp-o, ĝia apliko ĉe junkom-istoj, div. prezentaĵoj. Salutis la kunvenon esp. ruĝfrontano el Berlin, kiu hazarde estis en la urbo. Krom li ĉeestis du K-doj

el Koreo k Jugoslavio, kiuj antaŭ nelonge alveturis k ankaŭ fervore lernas esp-on. Tiu vespero malfermis al multaj indiferentuloj la okulojn pri la valoro de esp-o. Ankaŭ loka gazeto enpresas kurson k div. grupoj lernas laŭ ĝi. Ili povas ricevi klarigojn lingvajn 2-foje semajne ĉe la redakcio, kie esp-isto konsultas. *(10 513.)*

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Wüster, Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana. 4-a parto (Ir—Kor). Eldonejo: Ferd. Hirt & Sohn, Leipzig, Esp. Fako. Paĝoj 415—576. Form. 16×25 cm. Prezo: 15 mk. g.

Kiel la 3 antaŭaj volumoj ĉi tiu kvara prezentas seriozan laboron sur la kampo de esperantlingva vortara kreado. Novaĵo en tiu volumo estas, ke oni aldonis inter krampoj fontindikojn al ĉiuj zamenhofaj esprimoj k al tiuj nezamenhofaj esprimoj, kiuj estas ĉerpitaj el la Fund. Krestomatio. Sed ankaŭ tiu indiko estas nur provizora (multajn novajn tekstojn enhavas la nekonsiderita "Orig. Verkaro"). Multaj vortoj estas treege detale komentitaj en sia multforma uzo, ekz. *kapo* kun siaj kunmetaĵoj k derivaĵoj ampleksas ne malpli ol 7 kolonojn (3½ pĝ.) Al la pronomo *kiel* estas dediĉitaj pli ol 3 kolonoj. La vorton "kinemo" kiel mallongigon por "kinematografejo" (anst. kino, kinejo) mi malaprobas. Sub *komitato* oni povas legi klarigon pri la tuta organizsistemo de l' neŭtrala esp. movado. Sub *komo* oni informiĝas pri la plej laŭcela uzo de tiu multuzata interpunkcio. *Kindergarteno (lernludejo)* ŝajnas tute superflua en esp. vortaro (ĝi ne estas plene internacia vorto, kvankam tiu germanaĵo penetris en Sovetion k Anglion. *N. B.*

Oficiala Dokumentaro Esperantista. Dudekunua Universala Kongreso de Esperanto. (Budapest, 2.—9. aŭgusto 1929). Eld.: Internacia Centra Komitato de la Esp.-Movado, 1, Tour-de-l' Ile, Genève, Svisio. 115 pĝ. Form. 15×23 cm. Prezo nemontrita.

La libro enhavas la protokolon pri la 21-a univ. kongreso esp-ista, financan raporton, statistikojn, raportaron de la oficialaj institucioj, ankaŭ lingvaj, k aldonon pri la antaŭkongreso en Vieno.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Neue Ztg., München; *Nordb. Volksz.,* Nürnb., 28. 1., Esp. traktoro (275); *Krasni Til,* Iv. Voznes., feb., Negra kalvario (257, resumeto).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Signalen, Stokholm, 6. 2.; *Krasni Til,* Iv. Voznes., feb.; *Régénération,* Paris, feb.; *Münchener Post,* 2. 1., 4. 5., 27. 1., 28. 1.; *De Zaterdagavond,* Amsterd., semajna gazeto por revolucia popolkulturo artik. tutpaĝa de G. P. de Bruin (menciinde, ke la gazeto promesas ankaŭ estonte utiligi esp. materialon en speciala esp. rubriko; pere de K-do de Bruin en Enschede).

Peresper. materialon enpresis:

Neue Ztg., München; *Nordb. Volksz.,* Nürnb., 13. 1.

NIA POŜTO

14 225. — Ni jam plurfoje diris, ke ni akceptas nenian respondecon pri anoncoj. Ni supozas, ke la K-do, kiu metis la diritan anoncon, celas sciencan studon k ne havas pornografiajn intencojn. Cetere, neniu estas devigata respondi al la koncerna anonco.

670. — Pri ITF-servo ni informas la legantojn laŭ rekte ricevita komuniko. Iuokaze ni refoje atentigos pri la afero. — Vidu "Memornoton" pri la alia afero; ĉio alia ne senpage enpresebla.

1162. — Vidu resp. pri la afero al 670. Loko cetere mankas por pli longa priparolo.

30. — Ne tre valora! Ni mem jam skribis rekte al la K-do. N-on 4 (A. h.) ni uzos.

14 823. — Aperos siavice.

1745 k. a. — Ni respondas ĉi tie nur se oni faras specialan peton pri tio. — Ni ne trovis vian sciigon sufiĉe komunikinda por "S-ulo", sed rezervas ĝin por evtl. uzo en "L. L.". *Red.*

11 989. — Ni sendis vian let. al Paris.

Al kelkaj. — Certe, nur kiam vi posedas la *novan membrokarton* vi estas membro. *Adm.*

KORESPONDADO

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0.80 mk. g., ĉiu plia linio 0.50 mk. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago. L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo. Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

AŬSTRIO

K-do Karolo Klumaier (lokomotivhejtisto), XIX. Heiligenstädter Str. 119, 4./26, *Wien,* kun eksterlandaj fervojistoj.

BRITIO

K-do S. Leitch, 39 Hartington Street, *Derby,* pri literaturo, turismo k sporto, L, PI, gaz. Certe resp.

— Mi dez. ricevi leterojn el k pri Alaouites (Sirio). Adr.: K-do Baxter, 29 Wellfield Road, *Liverpool.*

FRANCIO

K-do J. Wutte, *Oberbetschdorf,* Bas-Rhin, kolektas festprogramojn k bult. de naturamikaj grupoj.

— Gek-doj estas petataj peri koresp-antojn el Italio al K-do: A. Flary, *Hilsenheim,* Bas-Rhin.

K-do Marcel Strubler (19 j., komencanto), *Baldenheim,* Bas-Rhin, interŝ. L, PK, PI, prec. kun K-dinoj.

K-do J. Cavaille, 2 Chemin des Sablonniers, *Lyon 3,* kun seriozuloj ĉl. pri div. temoj, L, PM, il. ĵurn.

GERMANIO

K-do Richard Borrmann, Johannastr. 18, *Weisswasser O/S.,* kĉl, pri ĉ. temoj, L, PI. Certe resp. al ĉiuj.

K-do Kurt Jorenda (ŝuisto), Georg-Marwitz-Str. 31/2, *Dresden-Dobritz,* serĉas seriozajn gekoresp-antojn el ĉl., L, PI, PK. Resp. garantiata.

K-do Fritz Bosse, Wallstr. 4, *Nowawes,* (membro de ĉefestraro en R.H.D.), kĉl. Resp. garantiata.

K-dino Herta Krause (17 j.), Adlerfels, *N.-Schreiberhau/Rsgb.,* kĉl pri junularmovado. Resp. garantiata.

— Laborista grupo juna interŝ. ekspozicicele PI, bfl. kĉl. Resp. garantias K-do A. Kleiner, Altwasser Str. 8, *Weisstein/Silezio.*

— Anoj de nia esp. kurso koresp. kĉl, pri ĉ. temoj. Resp. garantiata. Adr.: Hellmut Vogel, Bahnhofstr. 22, *Riesa/Elbe.*

K-do Gerhard Langner, Dresdner Platz 4, Sth., *Görlitz/Silezio,* kĉl, L, PK, PI. Ĉiam resp.

K-do Franz Heck, Rödelheimer Landstr. 113, ptr., *Frankfurt-Rödelh.,* serĉas serioz. koresp-antojn en Francio, Bulgario, Rumanio, Hispanio, Japanio k Ĉinio pri bredado de silkraŭpoj.

K-do Kurt Deutŝer, Bahnhofstr. 1-d, *Oybin/Zittau,* kĉl, pri div. facilaj temoj. Resp. garantiata.

K-do Fr. Hofmann, Stiehlerstr. 3, *Langebrück/Sa.,* kĉl, L, PI, PK.

— Esp. grupo "Frateco", Bertsdorf, koresp. pri ĉ. temoj, kĉl. Adr.: H. Kettner, *Bertsdorf, n-o 217 b. Zittau/Sa.*

HISPANIO

K-do Eusebio Garoz (22 j.), Str. Pelayo 38—40, *Madrid,* kĉl, pri ĉ. temoj, prec. pri literaturo, politiko, ekonomio, lab. organizmaniero ktp. Resp. garantiata.

KANADO

— "Esperanto-grupo", *Sointula, B. C.,* kĉl, pri ĉ. al lab-istoj interesaj temoj.

NEDERLANDO

K-do B. Bruins, Veeteeltstraat 66-b, *Amsterdam,* interŝ. PK, PI, PM kĉl. Nepre resp.

SOVETIO

K-dino Mario Berezina, Kontora Komunalnogo tresta, *Bogorodsk,* Niĵeg. kraj i okr., kĉl, pri ĉ. temoj.

K-do Nikolao Tiĥomirov, Krasnaja placo Ploŝjadj 14, *Bogorodsk,* Niĵeg. kraj i. okr., pri div. temoj.

K-dino Ĵenja Parujugina, Kontora C. r. K., *Bogorodsk,* Niĵeg. kraj i okr., pri div. temoj.

SOVETIO (daŭrigo)

Adresŝanĝo. — K-dino A. Gorbunova, Lesoteknikumo, *Solikamsk,* Uralo, (antaŭe en Perm), interŝ. L.

K-do V. V. Solovjev, ul. Stankeviĉa 4, lĝ. 2, *Moskvo-9,* L, PK, PI, gaz., kĉl. krom mezeŭropanoj.

K-do Johano Lukojanov, (kooperativa oficisto), Bolniĉnij per. 20, *Bogorodsk,* Niĵeg. okr., kĉl, pri div. temoj.

K-do G. Rogaĉev (studento), Goroĥovskaja 16, Polteknikumo de Ligilo, *Moskvo-66,* L, PI, kĉl, pri studenta k lab. vivo.

K-do B. Kalaĉev (studanto), Pr. K. Marks, 90, b. 3, *Leningrado,* pri stud. k. a. temoj.

— Grupo de lernantoj koresp. kun samaj lernantoj ĉl. Adr.: Siberio, *Pospeliĥa,* Rubcovskij okr., selo Kalmyckije Mysy al K-do M. L. Sannikov.

— Gelernantoj (11—12 j. 4. kl.), Puŝkinstrato 145, *Poltava,* kun infanoj el ĉl. pri infana vivo.

K-dino Nadija Ĥort (22 j), Kuzneĉna 7, *Priluki,* Ukrainio, kun eŭropaj k sovetiaj K-doj, nepre fraŭloj. Resp. garantiata.

— 3 K-doj koresp. kĉl, pri ĉ. temoj, interŝ. PI. Ni estas fervojistoj k komercoficistoj. *Rostov/Don,* Lengorodok, Lugovaja 145 al K-do Bakulin M. V.

K-do J. K. Troŝin; Koĵzavod 2, *Barnaul,* Siberio, revenis k renovigas koresp-adon, L, PK, PI, ĵurn., kĉl, pri ĉ. temoj. Senprokraste resp.

K-dino Heleno Reren, ul. Urickaja 45, *Pjatigorsk,* Kavkaz., kĉl, pri ĉ. temoj, L, PK, PI.

K-do Hejn S. V., Pokrovskie vorota, 18 kv. 5, *Moskvo* pri ĉ. temoj.

— Juna K-dino Mario Andreeva, Taganskaja 28, kv. 10, *Moskvo 4,* interŝ. belajn PI kĉl. Resp. garantiata.

— Grupo de tramistoj k red. de murgazeto serioze koresp. kĉl. pri ĉ. temoj. Ad.: Kruĵok Esperanto Oktjabrskogo tramparka, B. Kalitnikovskaja 44, *Moskvo 29.*

JARABONO

por membroj . . . 8 mk. g.
por nemembroj . . 9 mk. g.

Ankaŭ ¼-jare abonebla!

K-dino Kaufmann T (korektistino), Pokrovka 31, kv. 14, *Moskvo,* pri ĉ. temoj, precipe kun personoj interesiĝantaj pri poligrafio k eldonagado. Nepre resp.

K-do Usmanov Ŝamil, Gavrikova ul 3 kv. 55, *Moskvo 5,* la koresp-anto de tatara gazeto "Janalif", kiu regule enpresas artikolojn pri esperanto, korespondas kĉl pri ĉ. temoj. Respondo garantiata.

K-doj B. Maslov, Ŝmidta 70, *Lioni;* S. Ivanov, Ŝmidta 58, *Livny,* k Maslovskij, Krivcova plota, Doljansk. Rik, poŝto *Studonoje,* Eleck. okr., interŝ. L, PK, kĉl.

K-do J. I. Popov, Sadovij per. 4, *Sebrjakovo,* Jugo Vost. ĵel. dor. kĉl, pri ĉ. temoj. pref. foto-ŝanĝon.

K-do S. Stepanov, *Taranovka,* Ĥarkov. okr., kĉl pri ĉ. temoj.

K-do H. Gabrieljan, radiocentro, *Baku,* kĉl pri ĉ. temoj, L, PI. Resp. gar.

K-do J. P. Kinc, Novostrojka, 6 rajon, 195 Kvart. 20/11, *Aktjabinsk,* pri vivo k vivkondiĉoj de lokomotivgvidantoj ĉl.

K-do I. Semenuĥa, *Kliŝki,* Gluĥov. okr., Ukrainio, kĉl pri ĉ. temoj.

— 20 instruistoj koresp. kĉl, L, PK. Resp. gar. Adr.: Ukrainio, *Kremenĉug,* Domo de Klerigado, BRO.

— 100 gelernantoj interŝ. L, PK, kĉl. Adr.: Ukrainio, *Kremenĉug,* 9-a Laborlernejo, Gogolstr.

— Viglan koresp-adon garantias 150 gestudentoj pri ĉ. temoj, kĉl. Adr.: Ukrainio, *Kremenĉug,* Pedagogia Teknikumo.

— Rondeto de lernantoj koresp. kun infanoj el ĉl. Skribu al: *Odeso,* Komsomolskaja 94, 2 Trudŝkola.

— 16 Gek-doj koresp. kolektive k individue kĉl, pri politikaj, ekonomiaj demandoj, sporto, foto, radio, junulara virina liberpensula movadoj, klasbatalo, lab. vivo ktp., L, PK, PI, fotojn, librojn, ĵurnal., insignojn. Adr.: Odeso, Puŝkinskaja 32, red. "Molodaja Gvardia", Kruĵok Esperanto.

K-doj A. Korobov k S. Peŝeĥonan, Mos. Kaz. ĵel. dor, *st. Gorki,* der. Vraĉevo, kĉl, PK, PI, PM, ĵurn. Resp. gar.

USONO

K-dino Roso Nedelman (telegrafistino), 10 131 North Blvd., *Cleveland,* Ohio, kĉl. Gek-doj, precipe kun telegrafistinoj.

K-do Miĥael Semenoviĉ Omeljan
dez. koresp. kĉl. pri ateismaj, pedagogiaj, kulturaj, naturamikaj, ŝakludaj k. a. temoj; interŝ. PI, PK, il. presaĵ., amatorfotojn, esp-aĵojn; esperante, Internacional-stenografie, pole k ruse. Certe resp. Adr.: *Suraĵevka,* Zejskij okr., Ekstrema Oriento, USSR.

Proletara Liberpensula Asocio

en Köln (Germ.) okazigos la 15-an de marto publikan feston. Por pruvi la valoron de esp-o al ili, la tutmonda Gek-daro estas petata sendi salutkartojn k leterojn, kiuj estos laŭtlegataj dum la festo. Skribu multnombre al la adr. de l' peranto: Fritz Löw, *Köln-Mülheim,* Hacketäuerstr. 30 (Germ.) Ni rekompencos laŭ deziro.

Por festi "Internacian Virinan Tagon" kaj tagojn de Pariza Komuno kaj IRH, ni aranĝos propagand-ekspozicion. Bonvolu tuj sendi salutojn, PI, ilustritajn presaĵojn, esperantaĵojn — unuvorte ĉion, kio montros vivkondiĉojn de laboristoj, junuloj, pioniroj, instruistoj, edukistoj. IRH-anoj k. a. Ĉio sendota estos rekompencata laŭ deziro. Oni serĉas gekor. Adr.: Ŝkola FZS, SEU-ĉelo, K-do M. S. Omeljan, st. *M.-Ĉesnokovskaja* Ussur., Ekstr.-Oriento, USSR.

KIU REVOKOS?

17-jara fraŭlino

dez. koresp., PK, PI, PM, bfl. kĉl. Interŝ. gazetojn, ĵurnalojn, libretojn. Korespondlingvo dezirata estas: esperanta, germana k rusa. Nepre resp. Adr.: K-do Z. Aptekman, Sennaja ul. 158, *Rostov/Don* (Sovetio).

SENDIULOJ

Ĉelo de Sendiula Unio, 50 homoj lernas lingvon esperanto kaj deziras korespondi kĉl. pri ateismo, pri metodoj de Sendiula laboro.

Kolektas ilustr. ĵurnalojn, gazetojn kaj kartojn. krome kontraŭreligiajn (kontraŭdio kaj pastroj) afiŝojn.

Ĉiuj leteroj nepre estos respondataj; ĉiujn aĵojn ni ankaŭ kompensos per egalvaloraj Respondon garantias Iv.-Voznesenka Land komitato de SEU. Skribu laŭ adreso: USSR Ivanovo-Voznesensk Sovetskaja 208 kv dom kvart. n o 15. Jaĉejke Bezboĵnikov.

ATENTU!

LABORISTA GRUPO

dez. seriozan koresp-adon nur kun grupoj (ne kun individuoj), pri politikaj k ekonomiaj temoj, esp. movado k grupa vivo. Ni estas grandparte socialdemokratoj (17—46-jaraj), profesioj: oficistoj k manlaboristoj. Adr.: K-do Hans Kuhnert, Simonstr. 70/2, *Fürth/Bay.* (Germanio).

Geesperantistoj-konstruistoj
(ĉarpentistoj, lignaĵistoj, betonistoj, masonistoj ktp.) dez. koresp. kĉl., pri vivo de konstrulaboristoj, politiko, novaj konstru-inventoj ktp., per L, PK, PI, gaz., bildoj ktp. — Adr.: *Odeso,* Novoselskaja 86, Sojuz stroitelej, Sikar. Respondo garantiata.

Mi deziras korespondadi kun junaj laboristoj k junkomunistoj pri ilia laboro k ekzisto. Adr.: (USSR), Ukrainio, p/*Dunaevci,* Kameneckoho okr., poŝtkesto n-o 161, K-do V. Dmitriev.

ENHAVO:

	paĝo
„Grandaj viroj"	245—246
Libertempaj impresoj el Irlando . .	246
Ĉeĥa naciismo	246
Homara sento supervenkas naciismon	246—247
La turkoj artefaras lingvon	247
La skismo inter la laboristaro organizita malutilas ĉie	247
1870/71 kaj 1914/18!	247—248
La skandalo de la "Fremdula Legio"	248—249
Kulturtaskoj	248—249
Faktoj sen komentoj	249
Nordrusa vilaĝa ŝvitbanejo	249
Esperanto-Servo	250
Sennaciula Liberpensula Paĝo . .	251—252
Diskutejo	252
Tra Esperantio	253—255
Korespondado, Anoncoj	255—256

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)